HUNGARA VIVO

E

MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN

1

1971

8,—Ft

DUM VIA VOJAĜO EN HUNGARIO

vizitu niajn movmaterial-staciojn
En la tuta lando ni estas kompleze
je via dispono.

EKSTRA SUPER BENZINO 98.
EKSTRABENZINO 92. NORMALA BENZINO 86.
OLEOJ „MULTI GRADEN“

ÄFOR
BENZIN-OLAJ

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara
Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

✳

1971. XI-a jaro, 1-a numero

M. Gergely: Hungara Vivo estas dekjara.... 1
I. Örkény: La homo sopiras varmecon. Tr. J. Dévai 2
J. Szekeres: Panoramo 4
V. Benczik: Pensoj pri la Esperanta Literaturo 6
Gr. Gorin: Kial la bandaĝo estis sur la piedo? (Gasta paĝo) Tr. S. V. Filippov..... 8
É. Farkas-Tatár: Interparolo kun László Németh 9
Humuro 11
L. Kónya: Poemoj. Tr. K. Kalocsay 12
D-ro Gy. Kulin: Amatorastronomio en Hungario. Tr. A. Ponori Thewrewk..... 13
A. Münnich: Komputado kaj l'estonto de l-Internacia Lingvo 14
P. Balkányi: Komenius 16
Gy. Radó: Pri la Esperanta tradukarto en la finn-ugra kongreso. Tr. J. Mátéffy 18
M. Gergely: Internacia exlibris-kongreso en Budapeŝto 19
L. Kökény: Esperanto en Hungario 1950–1960 20
D-ro I. Szerdahelyi: Progresiva paŝo en nia movada historio 21
A. Csiszár: Sur la benko de akuzatoj 22
T. Ujlaky-Nagy: Sporto 23
L. Tárkony: Revuo de Revuoj 24
G. Vigh: Publika letero al usona profesoro.. 26
Teatra Kroniko 28
J. Tóth: Juneco, Juneco 29
Najbareco, amikeco 30
El la leteroj 31
Zs. Haszonits-Vargha: Recenzo 32
Krucvortenigmo:..... 32

Sur la kovrilpaĝo: Printempo — Foto de János Eifert

Ĉefredaktoro: *Mihály Gergely*
Responda redaktoro: *d-ro Jozefo Mátéffy*
Lingva revizio: *K. Kalocsay*
Arta redaktoro: *Jozefo Szekeres*

Redaktoraro:

d-ro Pál Avar, d-ro István Bácskai, Szilárd Bálint, Imre Botos, Ervin Fenyvesi, Lajos Lesznai, Alfonso Pechan, Aurél Ponori Thewrewk, Valeria Szabó, d-ro István Szerdahelyi, Tibor Ujlaky-Nagy, Gábor Vigh

Ĉefkunlaborantoj:

D-ro Géza Bárczi, Paŭlo Balkányi, Károly Jobbágy, Mór Korach, Ludoviko Kökény, Sándor Szathmári, Lajos Tárkony

La redakta komitato la unuan ĵaŭdon de ĉiu monato posttagmeze de la tria ĝis la kvina horo havas akceptotagon. (Bp. VIII., Kenyérmező utca 6.)

Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno, Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224–819

Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro
Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I., Budapest, V., József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo, por individuaj abonantoj la ĉeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.

La abono estas por jaro Ft 32.-, al eksterlando krome Ft 6.40 poŝtelspezo.

71.70822 Akadémiai Nyomda, Budapest
Responda gvidanto: György Bernát
Indexszám: 25.377

Hungara Vivo estas dekjara

Nia revuo ĉi-numere komencas sian duan jardekon. Dek jaroj en la vivo de kultura-arta revuo estas konsiderinda fakto; inter la revuoj Esperantaj, luktantaj, kiel konate, kun multe da zorgoj financaj kaj kolportaj, tiuj regule aperantaj kvardek numeroj estas rigardeblaj kiel valora evento, inda je ankoraŭ pli multa interesiĝo, je honoro, eĉ je iom da fiero.

Per ĉi tiu artikolo ni ne volas festi, nur memorigi niajn kunlaborantojn — kaj, ni kuraĝas esperi, ke ankaŭ niajn legantojn — pri la kara kaj grava jubileo. Kaj ni sentas nun utila, en la sojlo de la dua jardeko, ekzameni nian laboron, speciale niajn klopodojn, eksperimentojn kaj rezultojn en la lastaj du jaroj. Antaŭ du jaroj, nia celo estis doni al niaj legantoj revuon ankoraŭ pli altnivelan kaj modernan, tian revuon, kiu estas inda al la niaepoka ĵurnalismo. Ankaŭ per tio ni deziris dokumenti, ke la ideo de Esperanto, la ideo de la Internacia Lingvo estas unu el la plej modernaj, aktualaj, signifaj ideoj kaj problemoj de la hodiaŭa homaro, kaj ke la movado, kiu standardas disvastigi la lingvon kaj fine ĝin akceptigi kiel ĉies lingvon duan, ankaŭ mem kapablas konstante, senĉese renoviĝi, konformiĝi al la postuloj de la tempo. Tial la renoviĝon de nia revuo ni sentas necesa tiel same, kiel ni pensas bezonata la juniĝon, plimoderniĝon, plidinamikiĝon de nia movado.

Precipe en la lastaj du jaroj, diskuto akceptis kelkajn eksperimentojn de nia laboro. Ni ricevis malaprobajn, kelkfoje eĉ incititajn, ofendajn leterojn de iom da legantoj pro modernaj grafikaĵoj, aŭ pro exlibriso, aŭ pro novelo de hodiaŭa temo kun delikata seksa nuanco. Pri ĉi tiuj samaj, siavice, alvenis multe pli da leteroj ol la ĵus menciitaj, precipe de junuloj, kiuj ame gratulis niajn iniciatojn, kuraĝigis nin daŭrigi ilin, deziris la ĉiumonatan aperon de la revuo. Unuj ĉesis aboni pro tiuj iniciatoj, aliaj abonis ĝuste pro la pli modernaj formo kaj enhavo. Inter la aprobantoj ni trovas ankaŭ tridek hungarajn universitatajn studentojn. Kelkaj trovis malfacilaj plurajn skribaĵojn, aliaj kore bonvenigis la artikolojn de serioza tono. Pluraj nin riproĉis pro la kelkpaĝaj anoncoj (ili alportas monon!), bedaŭrante la forprenitan spacon; ili forgesis pri la kruda fakto, ke ankaŭ Ean revuon oni presas por granda sumo kaj ke ankaŭ aŭtorojn kaj tradukistojn decas honorarii (H. V. opinias tion kaj agas tiel). Sekve, se ne sufiĉas la mono de abonantoj plus la ŝtata subteno, oni devas sin helpi per la mono de anoncantaj firmoj; cetere, tiel faras ĉiu gazeto en la mondo. Krome, pri tiuj anoncoj ni ricevis plurajn leterojn de teknikistoj, inĝenieroj, kiujn ĝojigis la fak-terminoj troveblaj en la anoncoj.

Ne estas facile kontentigi ĉiujn pretendojn. Tamen ni ĝojis pri ĉiuj leteroj, ĉar ni lernis iom el ĉiuj. Eble niaj legantoj jam spertis kelkajn niajn elastajn reagojn je diversaj opinioj. Ekzemple, la fotajn titolpaĝojn pasintjare ni farigis laŭ la plaĉo de la legantoj, kaj en nia tuta laboro ni klopodas observi la diversajn aĝojn, la diversajn gustojn, ne deflankiĝante tamen de la difinita celo.

Espereble, niaj legantoj aprecos tiujn klopodojn de la redakcio, la rezultojn ĝis nun atingitajn, kaj subtenos nin per plua abono. Kaj se pasintjare vi ekamis nian revuon, ni petas vin, karaj legantoj, rekomendu ĝin al viaj konatoj kaj amikoj-korespondantoj, kaj, se vi havas por tio eblaĵon, abonu ĝin por unu aŭ du korespond-amikoj.

La redakcio promesas kompense, ke senĉese ni plibonigos la revuon, riĉigos ĝian enhavon, plibeligos ĝian formon. Ni deziras doni al niaj legantoj tian Hungara Vivo, pro kiu ili ne devos honti antaŭ esperantistoj, nek eĉ antaŭ eksteruloj.

Mihály Gergely

István Örkény:

La homo sopiras varmecon

Kiam finiĝis la antaŭtagmeza vizito, doktoro Gróh, jam irante eksteren, rimarkis, ke iu malsanulo vigle al li mansignadas.

Li iris al lia lito.

— Ne koleru min, ke mi retenas vin, sinjoro ĉefkuracisto — ekskuzadis sin la malsanulo, kies hararo dum la kelksemajna hospitala restado kreskis ĝis la ŝultroj. Lia eksteraĵo fariĝis tial simila al tiu de la apostoloj, precipe se ni konsideras liajn pie bluajn okulojn kaj lian mildan nazon similan al ĉampana korko. — Mi volus nur interesiĝi, kiaspecan hejtadon vi havas, sinjoro ĉefkuracisto.

— Vi estas fornisto, ĉu ne, oĉjo Kreibich? — demandis la kuracisto.

— Jes, vere. Ĉu, vi, sinjoro ĉefkuracisto, havas kahelfornon?

Doktoro Gróh ne respondis tuj. Unu minuton li devis pensadi. Unue, ĉar estis somero, kaj tiatempe neniu tenas sian fornon en memoro. Due, li estis tia homo, kiu ne taksis alte la benojn de la civilizacio. Li facile toleris la malkomfortaĵojn, li ne estis sentema je malvarmo, li manĝis tion, kion oni metis antaŭ lin, por la loĝejo li ne elspezis. En ĝi ĝuste pro tio estis nek tapiŝo nek bildoj, nek eĉ unu orfa kakto. Karakterize estis pri li, ke eĉ al iu speco de cigaredo li ne persistis; kion li ekvidis en la cigarbutiko, tion li aĉetis.

— Mi posedas nur simplan ferfornon, oĉjo Kreibich.

La okuloj de la fornisto ekbriletis.

— Kion vi dirus pri vere ekstrakvalita termokoaksa forno?

— Por mi taŭgas ankaŭ tiu, kiun mi havas — diris la kuracisto, alridetis la malsanulon kaj foriris el la malsanulĉambro.

Li estis kutimiĝinta al dankem-atakoj. Post bonsukcesaj operacioj oni donacis al li jam grasigitajn anserojn, divankusenojn, kafon, teon, mantrikitajn ŝtrumpojn, foje eĉ paron da poŝtkolomboj. Okazis, ke iu el liaj pacientoj skribis al li poemon; la komencliteroj de la versoj legitaj de supre malsupren, donis la sekvajn vortojn: Dio benu doktoron Miĥaelo Gróh.

La salajro de la hospitalaj kuracistoj estas magra. Sekve, ankaŭ li ne ofendiĝis, se liaj bonhavaj pacientoj diskrete metis koverton en lian manon. Sed li ne ŝatis la dankemdonacojn „en naturo", kaj tial, kiam oĉjo Kreibich denove faris aludojn koncerne la fornon, li decide deklaris:

— Dankon, oĉjo Kreibich. Unue, mi ne bezonas tiun termo-miraklon, due mi ne volas, ke vi havu elspezon.

La fornisto ekscitite eksidiĝis kaj elŝovis sian tuberan piedon el sub la kovrilo.

— Vi miskomprenis min — li diris. — Iom uzebla termokoaksa forno kostas okmil forintojn, sinjoro ĉefkuracisto. Mi ne volis donaci la fornon, sed mi pensis, proprakoste mi konstruus ĝin por vi, sinjoro ĉefkuracisto.

— Ne penadu, oĉjo Kreibich — ridetis Gróh. — Verdire mi iradas nur dormi hejmen. Kial al mi tia multekosta forno?

— Ĉu vi scias, sinjoro ĉefkuraĉisto, kio estas tiu termokoakso?

— Ne.

La dikfingro de la tubera piedo de oĉjo Kreibich komencis konvulsiadi.

— Ĉu vi eĉ ne vidis termokoakson?

— Ankoraŭ ne.

Oĉjo Kreibich, el kies ventro Gróh fortranĉis unu kaj duonan metrojn da maldika intesto, dum pluaj tri semajnoj kuŝis en la hospitalo. Dume li rompis, aŭ pli ĝuste muelis la reziston de la doktoro. Sed ne per argumentoj li venkis lin. Doktoro Gróh, kiam li mendis la fornon, ankoraŭ havis la konvinkon, ke li elspezas sian monon pro aĵo por li senutila. Oĉjo Kreibich venkis ne per siaj argumentoj, sed per la forto de la pasio. Ĉar la termokoakso-forno estis la pasio de oĉjo Kreibich.

Li registris, al kiom da budapeŝtaj familioj li konstruis jam termokoaksan fornon. Kun tiuj familioj dum jaroj li tenis kontakton, iele-tiele kiel patro, kiu kun riĉa doto edzinigis sian filinon. Li vizitadis ilin, pikincitis la fajron, karesbatadis la fornon, kaj intime palpebrumis al la dommastrino. Ĉie oni volonte lin akceptis. Je lia peto pluraj telefonis al Gróh (poŝtoficisto, mondĉampiono, operkantistino) gratulante lin pro la projektita forno, kaj invitis lin, ke li vizitu foje ilian termokoakson. La kuracisto sentis, ke se li plue obstinos, la koleron de altestimataj personoj li faligos sur sin. Unu motivo plia, ke li konstruigu la fornon.

Lia loĝejo — sur la norda deklivo de la monto Gellért — ne estis loĝebla dum du monatoj. Oĉjo Kreibich ĝin plenigis per kaheloj, feraj konsistaĵoj, portiloj, morterujoj, brikpolvo kaj malpuraĵoj. Tio por Gróh estis nenia ĝeno. Lia hejmo ludis suborditan rolon en lia vivo. Li ŝatis sian profesion. Ofte li laboris en sia sekcio ĝis la tempo de vespermanĝo. Ĉiun duan vesperon li pasigis ĉe sia ĉefo, ĉe adjunkto Warga, kiu ankaŭ estis olda fraŭlo, kaj loĝis en iu hospitala kuracistloĝejo. Dum la intertempaj vesperoj li aŭ entreprenis noktan deĵoron, aŭ vizitis siajn konatinojn. Same kiel pri ĉio alia, ankaŭ pri ampartnero li ne estis elektema. Li samtempe amindumis kvar aŭ kvin virinojn, precipe, ĉar ĉiuj estis same afablaj al li, kaj li ne povis decidiĝi por rompi la interrilaton. Karakterize estis pri li, ke li ne kapablis memorigi al si eĉ ilian nomon, kaj tial ĉiun li nomis „panjeto".

La hejtadsezono jam estis progresinta, kiam unue estis videbla iom da ŝanĝo sur doktoro Gróh. Iuvespere al

adjunkto Varga frapis la okulojn, ke lia amiko ofte rigardas la horloĝon.

— Kio estas? Ĉu vi havas rendevuon? — li demandis.

— Tute ne — mansignis Gróh. — Mi devus surmeti en mia forno.

La adjunkto gapis. Gróh elkuregis por telefoni, kaj kiam li revenis, ruĝiĝinte kiel papriko, li skoldis sian najbarinon, plumpan sorĉistinon, al kiu li pagas regulan monatsalajron, ke ŝi ĉiuvespere versu duonsitelon da koakso en la fornon.

— Se mi ne ekmemorus admoni ŝin telefone — li indignis —, ŝi denove estus forgesinta, tiu maljuna aĉulino.

— Kio do, — miris Varga. — Ĉu vi ne dormos en la hospitalo?

— Tion vi ne komprenas — diris doktoro Gróh supereme ridetante. — Temas pri vera termokoaksa forno.

Li apenaŭ aŭskultis sian amikon. Post iom da tempo liaj vizitoj ĉe li iĝis maloftaj, poste tute ĉesis. En la kirurgia sekcio oni rimarkis, ke Gróh komencas hejmenportadi la broditajn divankusenojn, ricevitajn de la pacientoj. Samtempe li aĉetis akvafortojn, kaj li akiris ankaŭ tapiŝon el dua mano. Tiutempe li jam pasigis preskaŭ ĉiun vesperon hejme; li sidadis, legis, aŭskultis radion, aŭ li dorse apogis sin al la forno kaj varmigis sin.

Ankaŭ siajn konatinojn li komencis neglekti. Unun el ili, kiu estis tre fidela, iuvespere li invitis en sian loĝejon. Kiam ili enpaŝis, la knabino ĝoje ekkriis:

— Kiel agrable varme estas ĉe vi!

— Tion mi kredas — fieris Gróh. — Nur bone rigardu, panjeto, kiaspeca forno estas ĉi tio.

Li brakumis la knabinon, altiris ŝin la al forno. Li klarigis, ke aŭtune oni metas fajron en ĝi kaj ĝi plu ne estingiĝos ĝis printempo . . . Ĉu vi scias — li demandis —, kiom tiu forno konsumas? Dekok kvintalojn de aŭtuno ĝis printempo!

— Ĉu tio estas multe aŭ malmulte? — demandis la gastino.

Gróh retiris sin de la knabino. Friske li traktis ŝin dum la tuta vespero. Ŝi estis kaj bela kaj saĝa, tamen lia intereso ĉesis pri ŝi. Li eĉ ne invitis ŝin denove. Post kelkaj malsukcesaj provoj li decidis likvidi la interrilatojn ankaŭ kun la aliaj. Li fariĝis hejmsidulo, eĉ homevitulo. Li fordonacis sian oper-abonon. Kiam li povis eviti, li ne entreprenis noktan deĵoron. El la hospitalo li rapidis rekte hejmen. Okazis, ke li tagmeze vokis taksion, veturis hejmen, dum kelkaj minutoj apogis sin dorse al la forno, kaj poste li trankviliĝinte revenis en la hospitalon.

La forno perfekte funkciis. Malmulte ĝi konsumadis. Ĝi donis egalan varmon. Neniam estingiĝis en ĝi la fajro. Per unu vorto: ĝi estis perfekta. Tiom perfekta, ke doktoro Gróh kelkfoje ekhavis strangajn pensojn. Ekzemple, ke neniaspeca vivanta kreaĵo — inkluzive ankaŭ lin mem — povas esti tiel perfekta, kiel termokoaksa forno.

Iom post iom li ekkonis ĝiajn ĉiujn fintojn. Li divenis, ke se li pliigas la trablovon, kiu kahelvico tiam eldonas unue la varmon. Li en-kaj enrigardis en la fajrejon, kie la koakso ĉerizruĝe ardante sinkis malsupren, kaj mallaŭte kraketis, kiel arda anobio . . . — Kiel mirinde — pensis tiam Gróh. — Interne ĝi estas varmega, kiel fandforno, ekstere varmeta kiel virina korpo. Kaj tiam li sentis tenton kisi la fornon.

Je la fino de februaro li anoncis sin malsana. De tiu tempo li jen eniris labori, jen restis hejme. Li ne estis malsana, nur ne deziris foriri el la agrable varma ĉambro. En unu el tiaj tagoj li telegrafis al oĉjo Kreibich, ke li morgaŭ vespere vizitu lin.

La fornisto enpaŝis. Li pikincitis la fajron, li frapadis la flankon de la forno, eĉ almetis la orelon sur ĝin tiel same, kiel la kuracisto kontrolas la funkciadon de la pulmo.

— Ĉu ĝi bone funkcias, sinjoro ĉefkuracisto? — li demandis.

— Grandioze — diris Gróh. — Sed mi vokis vin el alia kaŭzo. Mi divenis ion, oĉjo Kreibich.

La fornisto atendeme rigardis lin. Gróh apogis sin al la forno. Li atendis, ĝis li estos trapenetrita de la varmo.

— Ĝis nun — li diris poste — la homoj konstruis grandajn domojn, kaj en ĉiu ĉambro oni metis fornon. Ĉu oni ne povus fari tion inverse?

— Kiel inverse? — demandis la fornisto.

— Grandajn fornojn oni devus konstrui — revante diris Gróh —, kaj malgrandajn domojn en la grandajn fornojn . . . Kion vi opinias pri tio, oĉjo Kreibich?

— Je la unua aŭdo tio sonas iomete strange — diris la fornisto post iom da pensado. La kuracisto vane petis lin resti, li baldaŭ adiaŭis kaj hejmeniris.

La sekvan tagon oni en silento akompanis doktoron Gróh el la kirurgia sekcio de la hospitalo al la psikiatria. De tiu tempo li vivas tie. Li neniun molestas, ankaŭ nenio lin ĝenas. Li apogas sin dorse al la muro, mildvizaĝe rigardas en la nenion, ridetas.

Tradukis: **János Dévai**

Esperantista kandidato de la muziksciencoj

Kun sincera ĝojo ni gratulas al nia estimata samideano Ludoviko Lesznai, membro de la redakta komitato de Hungara Vivo, kiu la 18-an de Decembro 1970 ricevis la gradon „kandidato de la muziksciencoj" de la Hungara Akademio de Scienco por sia laboro „Muzika strukturo kaj arta enhavo".

Ludoviko Lesznai estas konata hungara muziksciencisto, aŭtoro de la verkoj „Mozart" (1956) kaj „Béla Bartók" (Leipzig 1961, dua eldono 1967); li prelegis ankaŭ en la Universitatoj de Halle kaj Greifswald (GDR).

Krom niaj legantoj, kiuj ofte renkontas lian nomon en la muzikaj artikoloj de nia revuo, li estas bone konata ankaŭ por tiu internacia aŭskultantaro, kiu ĝuis lian prelegon pri la hungara popolmuziko okaze de la 53-a UK en Madrid.

É. F.

panoramo

La ĵurio de la filmfestivalo de Chicago aljuĝis la premion de la plej bona scenarlibreto por la filmo *Magasiskola* („Alta Skolo") de la hungara István Gál. La filmo *Magasiskola* ricevis en 1970 en la kategorio de ludfilmoj ankaŭ la plej multnombrajn internaciajn invitojn.

Laŭ raporto de UNESCO en la socialismaj landoj frekventas plej multe da homoj kinejojn. En 1969 la nombro de la frekventantoj de kinejoj atingis en la socialismaj landoj 7 miliardojn. Sur la dua loko troviĝas la amerika kontinento kun 6 miliardoj, sur la tria Azio kun 5 miliardoj da kinejofrekventantoj. En Okcident-Eŭropo, kie la kino estas en krizo, nur 1 miliardo da homoj serĉis amuzon en 1969 sur la spektatorejoj de kinejoj.

*

Dum la interkonsiliĝo aranĝita en la budapeŝta Veterinarscienca Universitato fondis la reprezentantoj de Aŭstrio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, GDR, GFR, Pollando, Rumanio kaj Sovetunio Internacian Besthigienian Societon. La nova internacia organizo kunigos tiujn fakulojn, kiuj science okupas sin pri higienaj demandoj de grandbiena bestbredado. La Societo deziras doni helpon al la kunordigo de esplorlaboro konekse al la teknologio de la moderna bestbredado, al vastskala spertointerŝanĝo. En la fonda kunsido estis elektita prezidanto de la Societo D-ro Ferenc Kovács universitata profesoro. La sidejo de la prezidantaro kaj de la sekretariato — ĝis la fino de 1973 — estos Budapest. Hungarion petis la partoprenantoj de la kunsido aranĝi la unuan internacian bestohigienian kongreson, kiu antaŭvideble okazos en 1973.

En Nov-Delhi, ĉefurbo de Hindio prezentis sin okaze de ekspozicio aranĝita en Community Hall sep hungaraj eksterlandkomercaj entreprenoj kaj kelkaj pli grandaj fabrikoj. La devizo de la ekspozicio aludas pri tio, ke la telekomunikado, kiu plifaciligas la kontaktiĝon inter la popoloj, helpas la plifortigon de la amikeco kaj per tio kontribuas por la paca evoluo de la mondo. En funkcio estis prezentataj en la ekspozicio mikroondaj instalaĵoj, radiotelefonoj, industriaj televidaparatoj kaj aliaj produktaĵoj.

*

El la pli nova nederlanda libroeldonado donis gustumaĵon pri la terenoj de biologio, biokemio, medicino, matematika logiko, la komputiloj, la prilaboro de indikoj, fiziko, kemio, metalurgio, geologio, ekonomio kaj arkitekturo okaze de libroekspozicio aranĝita en Budapest la sciencaj eldonejoj North-Holland kaj Elsevier de Amsterdam. Dum la inaŭguro la nederlanda direktoro s-ro J. C. Baltser parolis pri la laboro de la antaŭ ne longe unuiĝintaj du Amsterdamaj firmoj, kiu hodiaŭ estas unu el la plej grandaj libroeldonejoj de Eŭropo. 200 novaj sciencaj libroj kaj 90 konstantaj revuoj aperas en ĝia agadsfero ĉiujare; plejparte angle, en la hodiaŭa gvidanta lingvo de la natursciencoj.

*

La reŭmatismo estas ĉirkaŭ ducent mil jarojn aĝa. Minimume 100 milionoj da homoj suferas je iu reŭmatisma malsano, dekoble tiom, kiom je kancero aŭ je tuberkulozo. Eĉ hodiaŭ ĝi starigas la kuracistojn antaŭ enigmojn, en tiomspeca formo ĝi aperas.

La unua disko-albumo pri hungara popolmuziko, konsistanta el kvar diskoj estis premiita per la okcident-germana gramofondisko-premio je rekomendo de Fono-forumo. Dudek sep diskoj estis premiitaj en la diversaj kategorioj el inter 320 diskoj de 25 internaciaj societoj.

*

Pli ol duonmiliono da tunoj jare el eksport- kaj importvaroj iras al la mendintoj plejparte tra la jugoslavia havenocentro Koper. La haveno estas evoluigita ankaŭ per hungaraj instalaĵoj. La nova havenocentro estis malfermita antaŭ dek jaroj. Okaze de tiu datreveno la direkcio de la haveno kaj la transport-entrepreno MASPED kune aranĝis akcepton en la Budapeŝta hotelo Duna-Intercontinental.

*

En osthistoj de la fumantoj — kontraste al tiuj de la ne fumantoj — troviĝas en pli granda kvanto plumbo kaj polonioizotopo. La radioaktiva polonio estas trovebla ankaŭ en la tabakfumo kaj supozeble ĉi tiu estas kaŭzanto de kancerestiga efiko de la fumado. La polonio-enhavo de la diversaj tabakspecioj dependas de sintezo de la tero kie la tabako estas produktata.

panoramo·panoramo

panoramo·panoramo

Rekordon atingis nia fremdultrafiko en 1970. En la pasinta jaro 6,5 milionoj da eksterlandanoj vizitis nian landon — 6,7 procentojn pli ol en la antaŭa jaro. El tiu nombro por 3,7 milionoj da turistoj Hungario estis la vojaĝocelo, la aliaj 2,8 milionoj travojaĝis nian landon. Denove montriĝis ne kontentigaj la hotelkapacito, la gastiga kaj komerca reto. Ĝis la komenco de la ĉijara ĉefsezono estos konstruitaj en Budapest, Visegrád, Dobogókő kaj ĉe la bordo de Balatono kune ĉ. 1600 hotela ĵlokoj.



*

La kvara IREN — Internacia Renkontiĝo Naturamika okazos en Abaliget (Hungario) de la 17-a ĝis la 27-a julio 1971. La antaŭpagojn oni devas ĝiri ĝis la 31. de marto 1971. Informojn donas kaj kore invitas: Organiza Komitato de IREN. Leteradreso: Pécs, 1. pf. 2. Hungario.

Tendumado de infanoj apud la lago Balaton

„Ĝoje ni informas, ke ni aranĝos dusemajnan internacian esperantistan tendumadon apud Balaton por infanoj 10—15-jaroj. La partoprenkotizo — 700 forintoj — inkluzivas tranoktejon, po 4-fojan manĝadon tage kaj ekskursajn elspezojn. — Organiza Komitato de la Tendumado, Pécs 1. pf. 2. Hungario.

Vizitante Hungarion uzu la servojn de

IBUSZ

la plej malnova vojaĝagentejo de la lando.

Hotelĉambro-rezervado
Aranĝo de pasport-kaj enirvizo-afero
Aĉeto kaj vendo de eksterlandaj valutoj
Biletoj por aeroplano, ŝipo kaj trajno

Ekskursoj kaj programoj
Urbospektadoj
Servo de fremdulgvidantoj kaj interpretistoj
Senpaga konsildona servo en vojaĝaferoj

Oficiala vojaĝagentejo de la Mondekspozicio de Ĉasado

IBUSZ AGENTEJOJ EN ĈIUJ URBOJ DE LA LANDO

REPREZENTEJOJ:
ĉe limstacioj en hoteloj kaj ripozlokoj

VI ŜPARAS MONON KAJ TEMPON UZANTE NIAJN SERVOJN

IBUSZ agentejoj eksterlande

Amsterdamo	Londono	Romo
Berlino	Moskvo	Saopaulo
Bruselo	Otavo	Stokholmo
Frankfurto	Parizo	Vieno
Kolonjo	Prago	

Vilmos Benczik:

Pensoj pri la Esperanta Literaturo

La specifa rolo de la literaturo en nia lingvo estas ĝenerale rekonita fakto. Estas do nature, ke ni devas doni distingitan atenton al la problemoj, koncernantaj la literaturon, kaj la konkludoj, kiujn rezultas la ekzamenado de la literaturo, certagrade estas validaj ankaŭ por la tuta movado.

La esperantistaro ĉiam estis kaj ankaŭ nun estas fiera pri sia literaturo, ebla tro fiera. La fiereco ŝajnas esti kvazaŭ „devo esperantista", kiun oni plenumas aŭtomate, sen multe pensi pri ĝi, kaj sekve la Esperanta literaturo evoluas laŭ la kapricoj de la hazardo (libera tempo de verkistoj, eldonebleco de individuoj ktp.), kaj kompreneble la rezulto de tia evoluo estas malofte kontentiga.

Ĵetante rigardon al la rikolto de la lastaj du jardekoj, ni konstatas teruran malekvilibron inter la ĝenroj. Atentinda, foje-foje eminenta poezio (Auld, De Kock, Ragnarsson, Sadler), kaj lamanta — ankaŭ kvante nesufiĉa — prozo kaj praktike nenia dramo. La poezio malgraŭ sia relative alta nivelo (aŭ ĝuste tial?!) havas la saman sorton, kiel la plimulto de la nacilingvaj poezioj: ĝin legas absurde malmultaj homoj.

La situacio de la prozo — branĉo, plej grava en nia epoko — estas plorinda. La nuntempa homo legas plej volonte prozon, sed la Esperanta libroeldonado ne kapablas kontentigi liajn pretendojn. Koncerne romanojn tio estas komprenebla, ja la eldonforto de Esperantujo estas tro limigita. (Tio tamen ne sufiĉe klarigas, ke bona originala romano aperas maksimume en ĉiu deka jaro.)

Pli malfacile estas klarigi la mizerecon de la novelrikolto, ja la plimulto de la Esperantaj revuoj havas spacon por tio, sed grandan parton de tiu spaco okupas tradukaĵoj, en bona kazo mezvaloraj, aŭ diletantaĵoj. Oni ne ĉiam trovas en la jara produkto du-tri kontentigajn pecojn. Ŝajne ne ekzistas verkistoj, kvankam la signifo de tiu ĝenro estas grandega, ja ĝi plene respondas al la cirkonstancoj de la nuntempa vivo. La homo de nia epoko estas intelekte laca por legi poemojn, disponas tro malmultan tempon por legi romanojn. Sed li ŝatas la ekscitajn historiojn, la eventriĉan rakontadon: por legi ducent liniojn li ĉiam trovas tempon. Ĉiu abonas unu-du revuojn, kaj tiuj revuoj povus esti la ĉefa kanalo de la Esperanta literaturo.

Interparolante kun hungara literatura kritikisto, foje mi menciis, ke ni havas — eĉ se malmultajn kaj malfortajn — teatrojn, sed ne dramon. „Interese — li respondis — mi supozis, ke estas inverse." Mi devis agnoski, ke li rezonis logike, tamen *vera* porsceneja dramo dum la lastaj du jardekoj ne aperis, kaj IAT ludas Ĉeĥov aŭ jugoslaviajn aŭtorojn.

Estas pensiga fakto, ke, se dramon ne, bonan rakonton foje-foje oni trovas en iu revuo, sed la ĝojo baldaŭ forflugas ĉar vane oni atendas la reaperon de la aŭtoro. Kial? Certe ne pro la rifuzo de la redaktoro, sed simple li perdas la intereson por la verkado.

La loĝantoj de la ekonomie prosperantaj landoj — kaj grava plimulto de la esperantistoj vivas en tiuj — ĝuas materian bonstaton, tamen la altiĝo de la pretendoj pelas ilin al monakiro. Oni povas diskuti pri la *ĝusteco* de tiu fenomeno, sed ne pri la realeco. Homoj kapablaj — kaj ĉi tie temas ekskluzive pri tiaj — ĝenerale ricevas por sia laboro bonan kompenson de la socio, kaj estus iluzie atendi, ke ili laboru kun la dezirinda reguleco por iu Esperanta revuo, kiu eĉ la poŝtelspezojn ne kapablas repagi.

Bedaŭrinde, laŭ mia scio krom *Hungara Vivo* neniu Esperanta revuo pagas honorarion. Estas klare, ke tiu fakto havas tre objektivajn kaŭzojn, tamen almenaŭ ĉe la gvidaj revuoj oni devus serĉi ian solvon, pagi almenaŭ la redaktoron kaj la ĉefajn kontribuantojn. *En mala kazo ni ne povas esperi, ke nia prozo elrampos el la ĝisnuna amatoreco.*

Bona stimulilo povus esti ankaŭ literaturaj konkursoj, konscie aplikataj kun klare difinita celo. Bedaŭrinde la Belartaj Konkursoj de UEA estas iom tro palaj, arte mortintaj. Multe bremsas ilian efikecon, ke povas aperi nur parto eĉ de la premiitaj verkoj, kaj ties nivelo montras, ke ne nepre indas scivoli pri la cetero, kvankam mi — neniel volante dubi pri la kompetenteco de la membroj de la juĝkomisionoj — volontege trafoliumus tiujn jare alvenantajn meze cent kontribuaĵojn, ja oni ne povas scii . . . Trarigardinte la liston de la premiitaj verkoj el la pasintaj jaroj oni trovas, ke la Konkursoj — precipe en prozo — *ne multe akcelas la aperon de novaj talentoj, ili fariĝis tereno kvazaŭ „privata" de kelkaj personoj.* Certe la deco postulus, ke gajnintoj ne plu konkursu . . . Kaj cetere, *ĉu ne estus plej saĝe ĉesigi la rutine ripetiĝantan ĉiujaran plurĝenran konkurson, kaj de tempo al tempo anonci konkurson pli atentfrapan por ĝenro, kiu pleje bezonas tian helpon?* Tio ebligus ankaŭ asigni *konvenajn* premiojn, kio siavice certe altigus la nivelon de la konkursaĵoj. La Esperanta novelarto plej baldaŭ bezonos tian specialan konkurson. Samspeca konkurso por IAT certe estigus almenaŭ kelkajn prezenteblajn unuaktaĵojn. *La kompetentaj instancoj devas sen prokrasto revizii la nunan formon de la Beletraj Konkurso kaj tiri la necesajn konkludojn el la nunaj anomalioj.*

Aktuale nia literaturo estas senmastra. En la tridekaj jaroj ĝi havis almenaŭ spontanee formiĝintan centron en Budapeŝto, sed en la lastaj tri jardekoj eĉ tia centro ne ekzistas. *Ne sufiĉas ami tiun literaturon, kaj foje-foje „apogaĉeti" librojn — necesas iom „organizi" ĝin.* La gvidaj instancoj de la movado devas doni pli da atento al ĝiaj problemoj, kaj antaŭ ĉio krei ian diskrete funkciantan „gvidan" organon, kiu en la ebla mezuro *planus* ĝian evoluon. *Tia organo — post eventuala refreŝigo — povus esti ekz. la Literatura Sekcio de la Akademio aŭ speciala komisiono, starigota de la Komitato de UEA.* Tia organo nepre ne ofendus la liberecon de la arto, ja la nuna „libereco" estas prefere orfeco. Oni devas esplori la latentajn rezervojn, materialajn kaj spiritajn, raciigi la utiligon de la disponataj rimedoj. Ĉia prokrasto kondukos al konsekvencoj doloraj.



PLILONGIGU VIAN EKSTERLANDAN RESTADON... MALLONGIGU LA VOJAĜTEMPON...

FLUGU PER MALÉV!

Rektaj fluglinioj inter BUDAPEŜTO kaj la ĉi-subaj urboj:

AMSTERDAMO	DAMASKO	LENINGRADO	PRAGO
ATENO	DUBROVNIKO	LONDONO	ROMO
BEJRUTO	FRANKFURTO	LUKSEMBURGO	STOKHOLMO
BEOGRADO	HELSINKO	MILANO	SOFIO
BERLINO	ISTANBULO	MOSKVO	TIRANO
VIENO	KAIRO	MUNKENO	TUNISO
BRUSELO	KIEVO	NIKOZIO	VARSOVIO
BUKAREŜTO	KONSTANCO	OSLO	ZURIĤO
	KOPENHAGO	PARIZO	

MALÉV biletvendejoj:

Budapest V., Váci utca 1.

kaj

Dorottya utca 2.

TELEFONO: 186—805

MALÉV

Magyar Légiközlekedési Vállalat

(HUNGARA AERTRAFIKA ENTREPRENO)

GASTA PAĜO

Gr. Gorin

Kial la bandaĝo estis sur la piedo?

Ekzistas anekdoto:

„Venas paciento al kuracisto. Lia piedo estas vindita.

— Kio al vi malsanas? — demandas la kuracisto.

— La kapo — respondas la paciento.

— Kial do la bandaĝo estas sur via piedo?

— Ĝi descendis."

Ĉi tiun anekdoton mi rakontis foje, gastante ĉe konatoj, ĉar oni petis rakonti ion ridindan. Do, mi rakontis. Ĉiuj ridis.

Sole nejuna sinjoro, sidanta ĉe la tablo vidalvide, rigardis min iel strange, dronis en mediton, kaj poste, kliniĝinte super la tablon, diris:

— Pardonu, mi, kredeble, ion ne komprenis . . . Kio malsanis al la paciento?

— La kapo.

— Sed kial do la bandaĝo estis sur la piedo?

— Descendis.

— Jes, tiel — diris la sinjoro melankolie kaj iakaŭze suspiris.

Poste li denove meditadis.

— Mi ne komprenas! — li diris post kelkaj minutoj. — Mi ne kaptas ĉi tie la humuron . . . Mi rezonu logike: al la malsanulo ja suferis la kapo, ĉu jes?

— Jes, la kapo.

— Sed kial la bandaĝo estis sur la piedo?

— Descendis.

— Strange — diris la sinjoro kaj foriris de la tablo.

Li iris al fenestro kaj longtempe fumis, enpense rigardante en la mallumon. Mi trinkis teon. Post kelka tempo li forlasis la fenestron kaj, sidiĝinte apud mi, mallaŭte diris:

— Tranĉu min, sed mi ne povas kompreni la „salon" de la anekdoto. Ja, se la homo havis kapdoloron, pro kia diablo li vindis al si la piedon?!

— Sed li ne vindis ja la piedon — mi diris. — Li vindis la kapon.

— Kial do la bandaĝo troviĝis sur la piedo?

— Descendis.

Li stariĝis kaj atente rigardis en miajn okulojn.

— Ni foriru de ĉi tie! — ne atendite li diris firme. — Ni devas priparoli.

Ni iris en la antaŭĉambron.

— Atentu, — li diris, metinte la manon sur mian ŝultron, — tio estas vere ridinda anekdoto, aŭ ĉu vi ŝercas?

— Miaopinie ĝi estas ridinda! — mi diris.

— Sed en kio fakte estas la humuro?

— Mi ne scias — mi diris. — Jen ĝi, ridinda!

— Eble vi preterlasis ian detalon?

— Kian do detalon?

— Nu, ni diru, la paciento estis unupieda.

— Sed kial?

— Se imagi la eblon, ke la bandaĝo vere descendis, tiam ĝi, rampinte tra la tuta korpo, devis ja kapti ambaŭ piedojn! . . . Aŭ tiu homo estis unupieda kriplulo.

— Ne! — mi kontestis firme lian hipotezon. — La paciento ne estis kriplulo!

— Sed kiel tiuokaze la bandaĝo ekestis sur la piedo?

— Descendis, — mi flustris. Li deviŝis malvarman ŝviton.

— Eble la kuracisto estis Rabinoviĉ? — li demandis subite.

— En kia senco? — mi ne komprenis.

— Nu, en kia senco li povus esti Rabinoviĉ? En ridinda senco.

— Ne! — mi intertrancis. — En tia senco li ne estis Rabinoviĉ.

— Sed kiu do li estis tiasence?

— Mi ne scias. Eble anglo aŭ kirgizo.

— Kial kirgizo?

— Tial ke lia patro estis kirgizo kaj lia panjo estis kirgizino.

— Nu, se liaj gepatroj estis kirgizoj, tiam certe . . .

— Jen do, estas bone! — Mi ĝojis. — Fine ĉio estas por vi klara . . .

— Por mi ne estas klara, kio doloris al la malsanulo.

— Ĉion bonan — mi diris, surmetis la palton kaj iris hejmen.

Je la unua post noktomezo mia telefono signalis.

— Mi telefonas pri la anekdoto — eksonis lia voĉo en la aŭskultilo. — Mi ne povas eĉ dormi . . . Tiu piedo ne lasas mian cerbon trankvila . . . Ĉu tie estas do humuro?

— Estas — mi jesis.

— Nu, jen, ankaŭ mi komprenas . . . Mi ne estas ja stultulo! Mi estas ja klera homo . . . Mi rakontis la anekdoton al mia edzino . . . Ŝi ridis. Sed kial ŝi ridis, mi ne komprenas . . . Mi jam ne scias kion fari.

— Dormi necesas! — Mi diris kaj demetis la aŭskultilon.

Li telefonis en la sekvanta vespero.

— Mi konsultis intertempe fakulojn — li diris. Ĉiuj asertas, ke la bandaĝo ne povis descendi!

— Nu, diablo al ĝi estu! Ne povis, estu do tiel, ne povis! Kion vi de mi volas?

— Mi volas solvi ĉi tiun problemon — li diris kolere. — Por mi tio estas principa afero . . . Mi ja havas ne malgravan postenon . . . Estas mia devo esti sprita! . . .

Mi deĵetis la aŭskultilon.

Post tio li tra kelkaj tagoj telefonadis, eĉ venis en mian loĝejon. Mi lin insultis, kraĉis, lin forpelis, ĉio estis senrezulta. Li eĉ ne ofendiĝis. Li streĉis al mi siajn serenajn okulojn kaj murmuris:

— Komprenu, por mi tio estas necesa . . . Mi ofte vizitas eksterlandon . . . Mi devas kompreni la humuron! . . .

LÁSZLÓ NÉMETH

Interparolo kun la sepdek jara verkisto



Estas malfacile prezenti verkiston, samtempulon, kies laboro- kaj intereso-sfero estas tiel vasta kiel tiu de László Németh. Romanoj, noveloj, dramoj, kaj — kion li nem plej alte ŝatas — eseoj montras lian aŭtoran kaj homan vojserĉadon, liajn fidoperdojn kaj tamen konstantan evoluon jam de 45 jaroj.

Li debutis kiel 25-jara kuracisto, gajnante en novel-konkurso de literatura revuo, kaj de tiu tempo li ne ĉesis ekzamenadi, per delikataj fingroj sed akraj okuloj de kuracisto, la problemojn de nia bolanta epoko, la simptomojn de la antaŭ-kaj postmilitaj jaroj de la niaepoka grandega socia ŝanĝiĝo.

Dum kelkaj jaroj — dum tiuj de la „fido-perdo" — li ne verkis originalaĵojn. Tamen ankaŭ tiu tempo de provinca retiriĝo ne estis senfrukta: li tradukis tiam de Ibsen, Shakespeare, García Lorca kaj unuavice de L. Tolstoj, kies personeco lin tiel profunde kaptis.

„Parolante pri Tolstoj — li diris en parolado okaze de la 50-a datreveno de la morto de Tolstoj — ni povas kalkuli pri la granda komuna memoro, ke giganto nin sidigis sur siajn genuojn, kaj, envolvante nin en sian varman elspiron, klarigis al ni la sencon de la vivo tiel, kiel li pensis tion konvena al nia perceptivo".

Lia deteniĝema naturo, kelkaj malindaj atakoj kaj fine lia malsano faris lin homevitema: plejparte de la jaro li vivas kiel ermito en puritana dometo sur la Balatona duoninsulo Tihany en la kaŝa ripozloko Sajkod.

Lastatempe lia reputacio pli kaj pli refortiĝas. Krom la hungara Kossuth-premio, li estis honorigita en 1965 per la Herder-premio en Vieno (kune kun Zoltán Kodály), kaj en 1968 li ricevis sovetan honor-medalon rekompence por la tradukado de rusaj kaj sovetaj beletraĵoj. Du hungaraj eldonejoj entreprenis en 1968 aperigi dum kelkaj jaroj en sinsekvaj volumoj lian tutan verkaron. La 10 romanoj, la dramoj kaj la eseoj ampleksos 18 volumojn.

En sunbrila aŭtuna antaŭtagmezo ni vizitis lin en lia silenta provinca azilo kaj notis la intervjuon por nia revuo

— Laŭ malnova tradicio — ni komencis la intervjuon —, preĝej-konstruintoj kaŝas en metal-globeton de la turo skribaĵon pri si mem kaj pri la siatempaj cirkonstancoj por la malproksimaj posteuloj. Kian mesaĝon postlasus la XX-jarcenta hungara verkisto László Németh por la generacioj vivontaj eble post cent jaroj?

— Ne pensu, ke mi disertos pri atomfiziko aŭ komputiloj. La verkisto ne bezonas antaŭsalti tiel malproksimen: tiun dokumenton por la tura globeto li pretigas dum sia tuta vivo per sia verkaro. Parolante al samtempuloj, li parolas kaj metas demandojn ankaŭ al la sekvontaj jarcentoj. Kiun mi elektus el miaj verkoj por prezenti mesaĝon al la homaro? Mi pensas pri la romano „Eszter Égető". En la persono de Eszter, virino de urbo sur la hungara Granda Ebeno, troviĝas en eksterordinara mezuro tiu virina eco, ke, kie ajn ŝi vivas, ŝi provas teksi malgrandan

---

Tiam mi decidis verki pri li rakonton. Skribi pri la homo ne havanta senton de humuro. Pri la homo, kiu volas prezenti la misterajn leĝojn de la ridindo objektivege, kvazaŭ ian tabelon de multobligo.

Mian rakonton mi portis al la satira fako de iu revuo. La fakredaktoro longtempe ridis.

— Jen estas vera kverko! — Diris la redaktoro. — Ĉu tiaj ekzistas?

— Ekzistas — mi diris. — Mi mem lin vidis.

— Nu do, ni presu ĝin — diris la redaktoro.

Poste li ĉirkaŭbrakis min kaj, kliniĝinte al mia orelo, demandis mallaŭte: — Nun, diru do al mi konfidence, kio doloris al la paciento? . . .

— La kapo . . . — mi apenaŭ flustris.

— Sed kial do la bandaĝo troviĝis sur la piedo?!

Mi komprenis, ke la rakonto kredeble ne estos presita.

Tradukis: **S. V. Filippov, Irkuck**

edenon el la fadeno volvita de sur sia koro. La romano rakontas naŭ tiajn „edeno-teksadojn", kaj ankaŭ tion, kiel forskrapas ree kaj ree la jam elformiĝantan reton de la feliĉo la balailo de la frenezo, la senkompreneco de viraj monomanioj, tamen ne povante rompi la aranean teks-instinkton de la heroino. Ĉi-romane mi priskribis unu el la principaj sentoj — aŭ halucinacioj — de mia vivo, ke nome nur hareto nin apartigas de la bela kaj bona vivo, ke nur tiun ni devus transpaŝi. Sed tiu hareto estas la homa naturo mem — aŭ, se ni volas esti optimistoj kaj pedagogoj: ĝi estas restaĵo de la malfacile forpelebla paseo. — Kial ĉi tiu romano estas mesaĝo? Ĉar tiu sento, kiu ĝin verkigis, hodiaŭ kreskas en la eminentuloj de la homaro kiel impreso memoriganta inkuban sonĝon. Harmonio interbrakumanta la tutan homan mondon kaj tuj apude pereo de ĉiuj vivantoj neniam ĉeestis tiel samtempe en la konscio de ĉiuj pensuloj kiel interkompren-instiga kaj frenez-ekscita eblaĵo. Kaj, se ni jam skribas mesaĝon, ĝi ĉeestas ĉe la radikoj de ĉiu volo responsa pri la futuro. Kion do aldoni al ĉi tiu mesaĝo, por ke ĝi parolu ankaŭ al la leganto vivonta post cent jaroj? Nur unu demandon. Ĉu tiu ĉi granda zorgo ĝis tiam malaperos el inter la vivantaj timoj de la homaro? Ĉu ĝi estos ankoraŭ zorgo eĉ pli prema ol por ni por la tiama homo, aŭ ĉu li jam estos ĝin solvinta kaj remos jam al aliaj?

— Multaj riportistoj metis jam al vi demandojn pri temoj plej diversaj, sed certe troviĝas demando ankoraŭ neniam al vi metita, kvankam inda je meto kaj respondo.

— Ke la riportisto metas antaŭ min nur demando-signon, kaj lasas al mi tekstigi la demandon, tio pretendas aŭ tre altan aŭ tre personan respondon. Por la unua mi ne sentas kapablon; post iom da hezitado mi provos do la alian. Jen la demando: Kio estas, pri kio la verkisto, aŭ, ni diru, la homo, inter neniaj cirkonstancoj rajtas rezigni? Kaj la respondo: La fervoro, per kiu li kroĉiĝas al sia vera vivsukceso, aŭ, per malnova bela vorto: al la „salvacio" de sia vivo. Kiuj konas la historion de mia vivo, tiuj scias, ke tia fervoro ne mankis al mi antaŭlonge, eĉ tiam ne, kiam la timo de damno el ĝi sonis. Vi scias, ja, ke ĉi tiu timo faris min dramverkisto: la time domaĝata „salvacio" verkigis tutan vicon de miaj dramoj. Eĉ post la „jaroj de tradukado" ne mankis ankoraŭ la fervoro. Kio alia estis la dramo „Galilei" ol senespera kaptado ale al la ĉirkaŭpremata, sufokata afero de „salvacio". La manko aperis kun mia malsano. Tiam mi ne sciis, ke tiel longan tempon — 17 jarojn — mi povos de ĝi eldevigi. Mi opiniis tiutempe, ke mi rajtas zorgi pri nenio krom mastrumi pri miaj fortoj por povi ankoraŭ skribi kiom eble plej multe. Kaj intertempe mi forgesis lukti por la „salvacio": akceptis la kondiĉojn, kiujn la cirkonstancoj, la ĉirkaŭantoj por mi preskribis. Elĉerpiĝis la forto necesa por la verkado, kaj tio ankoraŭ ne estus malbona, sed estingiĝis ankaŭ la fervoro, kiu direktas la luktadon por „salvacio". Mi ne ribelas, sed timas, min submetas apatie al la silenta damniĝo.

— Kion el viaj verkaĵoj vi rekomendus, ke ni ĝin traduku por la internacia legantaro de H. V., konsiderante la striktajn ampleks-eblaĵojn en nia revuo?

— Mi elektus parton el la enkonduko de unu el miaj studoj pri L. Tolstoj.

En la servo de Tolstoj

Kiel verkisto jam maljuniĝanta mi pasigis du jarojn en la servo de Tolstoj. Ne tiel, ke mi servis ankaŭ lin, sed tiel, ke mi faris nenion alian ol lin servi.

Mi konis Tolstoj, kompreneble, jam ankaŭ pli frue . . . Sed tia legado, koniĝado, ankaŭ tiam, se ties celo estas verki eseon (eĉ libron pri Tolstoj), tute ne estas komparebla kun tiu de la tradukisto. Ĉi tiu diktas ja la tekston nur kun la kvinono aŭ dekono de la kutima kaj peke hasta rapideco de la leganto, kaj poste, dank' al la hodiaŭa sistemo tradukista, li ankoraŭ ses- au sepfoje trapasas super sia teksto. Ĉi tio jam ne estas tia kono, kian en societo oni akiras pri alia membro de la societo. Tiajn konojn la servistoj akiras pri sia sinjoro, sciantaj, sur kiu flanko li dormas kaj kie lia jako fariĝas falda.

Tio, ke ĉi-okaze ankaŭ la verkisto mem estas sinjoro — eĉ se malgranda sinjoro —, kiu tamen naskiĝis prefere por verki ol por traduki, nur pliigas, eĉ ne la povon, sed la devigitecon por observado. Ĉi tiu kono estas multrilate pli lojala ol tiu de la veraj servistoj; la pseŭdoservisto scias ja, kiom da neeviteblaj eraroj oni kulpas estante sinjoro, sed aliflanke ĝi estas ankaŭ pli akra: la kaŝitajn malperfektaĵojn — eble, ĉar tiuj ekzistas ankaŭ en li mem — li malkovras pli facile. Tiujn malperfektaĵojn, kiuj al la neskribitaj leĝoj de la vera sinjoreco — kaj ĉi tie temas pri la plej granda sinjoro de la novepoka literaturo — estas kontraŭdiraj.

Aristokratio en la 19-a jarcento troviĝis jam nur en Ruslando; nu, ankaŭ en Britujo, sed ĉi tiu iome-duone estis merit-aristokratio: akademianojn oni nomis lordoj. Aliloke la kulturitan, mecenatan aristokration pereigis la revolucio. Malpli grandparte, kaj nur en Francujo, la gilotino, pli grandparte la teruro pro revolucio. Ekzemple la Aŭstria aristokratio, kaj kun ĝi ankaŭ granda parto de la hungara, aranĝis sian vivon baze de jena silogismo: la revolucion la klerismo faris, la revolucio nin senkapigas, do la kulturon oni devas redukti maksimume je ia pasio de kolektado. Sed en Ruslando la aristokratio estis ankoraŭ en florado tra granda parto de la jarcento, kaj pri tio atestas, eĉ pli efike ol la dekabrista movado: la plej riĉa literaturo de la jarcento.

Ĉi tiu aristokratio, eĉ se ĝi servis despoton, havis ne nur kulturitecon, sed ankaŭ agosferon, en kiu ĝi povis disvolvi siajn kapablojn kaj akiri multflankajn spertojn. Tiu parto, kiu estis altirata de la kortego, administris la aferojn de la granda imperio; la provinca, pli oponema, pli praorigina parto okupiĝis pri la lokaj aferoj en la zemstvoj. *Anna Karenina*, kiu, kiel ĉiu bona socia romano, fariĝis historia romano verkita pri la nuntempo, prezentas tre bonan bildon pri la aktiveco kaj precipe pri la nivelo de tiu aristokratio. Eĉ en tiuj figuroj, kiujn hodiaŭ oni nomas „negativaj".

Se oni serĉas la sekreton, kiel naskiĝis, kaj precipe kiel

kreskis granda la rusa literaturo, kuriozmaniere oni trovas bonŝanca ĝuste tion, ke caro Aleksandro iĝis pli kaj pli malpopulara ekde la dua duono de sia regado (ĉe Puŝkin kaj Tolstoj ofte temas pri tio ĉi), kaj uzis nur la servojn de la malpli serioza parto de la aristokratio, dum la pli valora, pli provinca parto premiĝis pli proksimen al la popolo. Ĉi tiuj provincaj aristokratoj, al kiuj ankaŭ Tolstoj apartenis, eĉ se ili havis pli grandan bienon, apenaŭ estis pli riĉaj ol niaj pasint-jarcentaj nobeloj kun sia bieno de du aŭ tri mil arpentoj; kaj ĉi tiuj nobeloj hungaraj preparis kaj parte trafaris ja ĉe ni la reformepokon.

La alia granda bonŝanco de la rusa literaturo estis la literatur-objekto, kiu proponiĝis al la spirito universaliĝinta en la dulingveco kaj duanimeco. La verkiston, precipe la realisman, nur duone kreas lia talento, duone li kreiĝas el tiu materialo, en kiun li naskiĝis. Grandega sortodonaco estis por la rusa literaturo, ke estis ĝi, kiu la metodon kaj la vidpunktojn de la novepoka pensado aplikis la unua al popolo orienta, ekster-Eŭropa. La hungara elito, eĉ se ĝi vivis en subevoluinta lando, troviĝis pli proksime al la ĉirkaŭaj cirkonstantoj. Se ĝi meditis pri ili, tion ĝi faris kun iela kadia saĝeco, kun intenco de plibonigo, sed kun ridetanta rezignacio. La rusa elito staris pli malproksime de la cirkonstancoj, kiujn ĝi observadis, la distanco ĉe ĝi estis sufiĉe granda por tio, ke ĝi jam fariĝu perspektivo, kaj ke la vivo de la popolo, al kiu ĝin ĉenis la naskiĝo kaj la epok-ideoj (romantiko, nacionalismo), veku en ĝi krom bele animagordaj sentoj ankaŭ rimarkon de veraj problemoj.

La akiraĵoj de la literaturo multrilate similas al tiuj de la scienco. Ankaŭ en tio, ekzemple, ke ili devas esti konceptataj en lingvo de universala valideco. Eĉ la plej granda scienca malkovro povas perdiĝi, tiel ke oni devos ĝin poste liberigi el sia ekstravaganca ŝelo, se ĝi ne estas konvene fiksita. Tia sama universale valida esprimperfekteco pasas ankaŭ tra la naciaj proprecoj de la naciaj literaturoj, farante la literaturajn malkovrojn kompreneblaj ankaŭ por aliaj popoloj. Multajn grandiozajn trovaĵojn de nia *Zsigmond Móricz* estos malfacile montri al la mondo el tiu kaŭzo, ke ĉi tiun lingvon li parolis iom kun hungara „provinceco". Male, tiun universale validan lingvon, originantan en sia verkista kulturiteco, kaj la kunligitajn vidpunktojn, la rusa literaturo ricevis preskaŭ jam en la lulilo; samtempe ĝi raportas pri tia popolo kaj mondo, pri kiuj ĝis nun neniu verkis laŭ okcidentaj metodoj kaj tiel ĝisfunde. Do, kaj la metodo estis perfekta, kaj la objekto estis eksterordinara.

Krom tio, en tiu literaturo latentis — jam ekde Puŝkin kaj Gogol — granda tasko, interesanta la tutan homaron. Granda evento de nia jarcento estas (ankaŭ laŭ okcidentaj historio-filozofoj) la plivastiĝo de la novepoka okcidenta civilizacio en mondan civilizacion; kaj ĉi tio, ni aldonu tuj, kuniras kun la disfalo de la okcidenta hegemonio. Dume, ne nur la kolonian sistemon oni devas likvidi, sed ankaŭ la baroj de la okcidenta pensmaniero estas trarompendaj, ĝis ankaŭ en ĝi ricevos por si lokon ia pli plena humaneco, kiel en la Unuiĝintaj Nacioj la ĝis tiam ekzotikaj nacioj. Sed tio, ke la egaleco: „homo = okcidenta homo", sur kiu konstruiĝis la novepoka literaturo, estas falsa kaj fariĝos pli kaj pli falsa, komencis konsciiĝi en la rusa literaturo. La rusa provinca, opozicia aristokrataro kaj la rusaj intelektuloj al ĝi indaj, kiam ili prenis sian lastan armilon, la plumon, ricevis, en sia kulturiteco kaj en la vidata literaturobjekto, tian taskon, kiu ankaŭ hodiaŭ estas la tasko plej granda: paroligi per la metodoj de la okcidenta civilizacio ne nur la rusan homon, sed ankaŭ la neokcidentan, kiu ne laŭiris la historian evoluon de Okcidento, kaj plivastigi dume ankaŭ la metodon mem, tiel ke ĝi fariĝu pli taŭga prezenti ankaŭ ĉi tiun pli ĝeneralan, praan homecon.

Kompilis kaj trad.: **Éva Farkas-Tatár**

HUMURO

La edzo revenas de longa provinca vojaĝo kaj demandas la edzinon, ĉu ŝi restis al li fidela.

— Kompreneble — ŝi respondas.

— Kaj vi?

— Dum la tuta tempo nur vi estis en mia penso.

Ili enlitiĝas, dormas. La edzino, en sia sonĝo, subite krias:

— Ve, mia edzo venas!

Je tio la edzo vekiĝas, saltleviĝas kaj elsaltas tra la fenestro.

*

Du infanoj interparolas:

— Mi jam scias, kiel naskiĝas la infano.

— Vi estas azeno. Mi jam scias ankaŭ tion, kiel ĝi ne naskiĝas.

Juna pentrartisto edzinigas modernan knabinon. Post kelkaj semajnoj oni demandas la junedzinon:

— Nu, kiel vi vivadas?

— Bone — ŝi respondas. — Mia edzo pentras, mi kuiras, kaj poste ni divenadas, kio do estas, kion li pentris kaj kion mi kuiris.

*

En drinkejo drinkas sinjoro. Konato lin alparolas:

— Mi treege miras, ke vi drinkas. Vi estas ja sekretario de la Anti-Alkoholisma Asocio!

—Jes — respondas la sekretario. — Sed nun mi havas la ferion.

— Jes, jes, amiko — diras la kuracisto al la sportisto —, via febro estas 39.9°.

— Ĉu vere? Kaj kiom estas la mondrekordo?

*

En societo temas pri refreŝigejoj de la Sindikata Konsilio. Iu diras:

— La plej praktika kaj atentema gvidanto troviĝas en la refreŝigejo de Balaton-Beato.

— Kial, kio estas tie?

— Tie, mi petas, je la sesa horo matene dungito ĉirkaŭiras kun sonorileto en la koridoroj kaj kriadas: „Estas la sesa, ĉiu reiru en sian ĉambron!"

LAJOS KÓNYA

KIE VI ESTAS, ORIOLOJ?

Orioloj, vi, kantbirdoj sol-melodiaj, senresponsaj
flamigiloj de l'ĝardeno, kie vi 'stas jam, fenomenoj?
Ĉu sekeco murda pelis vin el ĉi pejzaĝo soifa,
aŭ ni tedis vin per niaj klaĉoj kaj lamentoj eternaj
kaj vi, oraj sonĝoj, pasis al ĉiel-region' alia?
Araneo plektas retojn sur la senornamaĵaj branĉoj
de la persikarboj, kiuj moviĝadas vin memorante.
Viajn laŭtjubilajn fajfojn la vastvolba ĉiel' tagiĝa
plu ne eĥas, ho, mi mem ne sciis, kio do al mi mankas,
kial do mi rigardadas la ĉielon ire-reire.
Orioloj, vekhorloĝoj oraj, flutetantoj amataj,
sen vi la somer' ne plenas, mankohava la harmonio.
Tiel ja necesas via fola kant': „Ne fidu la viron",
kiel roso al la kampo, amo fidela al knabino.

NIMBO

Nin liberigu Disinjoro
disde l'potenc-ebriuloj
al kiuj facile ekstreĉas
la alkoholo la kranion,
kaj tiam el ili
eksplodas la pranaturo,
ŝiriĝas la teg' de ilia
disciplinига inhibicio
kaj ni povas vidi
ilian nudan memon
Al kelkaj eĉ gluto sufiĉas
por esti malkovrita,
por montri la kruelan
cezar-vizaĝon lupajn dentojn
Kaj se li grimpis alten
li ne rekonas siajn samlernejanojn
viumas ilin kiel fremdajn
nenion-neniun memoras
precipe ne tiun
kiu siatempe
skribis liajn lernekzercaĵojn
sur kies dorso li gimnastikis supren
Matene li surmetas nimbon
anstataŭ ĉapelo
per sia rigardo sublima
preterrigardas super ni
kiel al kiu la cerbo bolas
de landaj zorgoj
Ĉu li ne scius ke la lando el ni
sin kunmetas
kies sorton eĉ por mangesto
indigi li ne pretas?
Nur supren al la alto
li okulas dum irado
ĝis foje li falos surnazen
kaj ruliĝos malproksimen
lia brilanta nimbo el lado

LA RAJDARTISTINO

La rajdartistin fariĝos ĝuste tia
veanta ĉielŝiradanta
maljunulin kiel la ceteraj
Avarados kurados
lamentados
Ŝia kredomondo stos eksterorda
ofte ŝi survestos
mantelon grizan
de sensenca pieco
Kaj ne trovos en ĝi trankvilon

Sub la mantelo
turmente portos sian edenon
la multescia korpo
la iam strase plakita
intervuale luliĝanta
streĉita
arke saltanta
infren de ĉeval supren al ĉeval
fluganta galopanta

Kiel valorperdintan
oldan moneron portos
siajn memorojn
la korp falemiĝanta
kaj en la preĝdomo ŝi
elmetos ilin vice
antaŭ sin
pri ili plezurados
ŝiaj oldaj okuloj
palpebrumantaj pro la lumo
ĝuste sufiĉa
por ĝismorte trabrili
ŝian griziĝintan vivon

LA ROMIANO

Mi la legiestro
kuŝas en la tomb elfosita
loke de mia kor
sub la volb de miaj ripoj
stas mallumo de vako
Kiel krucumita aglo
ekbaraktas mia memoro
sur la Baltaj vizaĝostoj
de kampulin barbara
Tage dudek-kvinfoje ŝi tramuelas
la lernitan tekston
kaj kiel iu kaptinta birdon
premas pugne la monereton
kiun en ŝian polmon metas
la turistoj
Poste ŝi fermas super mi la lignopordon
dormu plu romiano
Kaj mi ree kaj ree mortas
pro Panonio

Tr. **K. Kalocsay**

Lajos Kónya (nask. 1914), Kossuth-premiita poeto. Post la liberiĝo liaj versoj estis plenaj de konfido kaj entuziasmo, respondis preskaŭ ĉiun eventon publikvivan. De 1954 li fariĝis sombra meditema, poste kelktempe silentis, de 1958 ree aperigas poemojn, en kiuj ofte sonas la voĉo de sinforgesa solviĝo en la naturo kaj de la antitezoj de la nuntempo de la homaro. La supra bildo montras lian lignoskulptaĵon. Ĝia titolo: Amo.

Amatorastronomio en Hungarujo

Dro György Kulin direktoro de Observatorio Uránia prez. de Amika Rondo de Astronomio

Post kiam en la liber-milito de 1848—49 la aŭstriaj kanonoj ruinigis la ŝtatan observatorion sur la Budapeŝt-a Gellért-monto, dum duonjarcento la lando ne posedis astronomian observejon. Vivis plue tamen la jarcentaj tradicioj de la hungara astronomia kulturo. Privatuloj subtenis la porastronomian intereson.

La hungara amatoro-movado burĝonis en la 1920-aj jaroj inter la kadroj de la tn. Astronomia STELLA-Asocio. Ĉi tiu movado konsiderinde plifortiĝis post la dua mondmilito. La Hungara Astronomia Asocio nombris baldaŭ 2200 membrojn. La daŭrigo de ĉi tiu iniciato kondukis — jam en la kadro de la Sciencpopulariga Asocio — al la nunaj rezultoj. La landajn amatorojn unuigas la Amika Rondo de l'Astronomio. La nombro de la anoj kreskas konstante: en la fino de la pasinta jaro ni registris jam la 4000-an aniĝintan amatoron!

La dumonata revuo de la movado estas la „Föld és Ég" (Tero kaj Ĉielo), kiu aperas en 15 000 ekzempleroj — kaj kiu havas ankaŭ esperantlingvan enhavo-tabelon. Ĝiaj artikoloj informas la interesiĝantojn pri la novaj rezultoj de la astronomio, spacesplorado — krome pri la novaĵoj geografiaj, geologiaj ktp., kaj donas praktikajn konsilojn al la amatoraro.

La unua hungara demonstra popola observatorio, la Budapeŝt-a *Uránia Observatorio* fondiĝis en 1947. Ĝi donas al la granda publiko sciencpopularigajn prezentadojn, filmprojekciadojn kaj trateleskopajn demonstradojn. Ĉiutage — krom la festotagoj — povas viziti ĝin la lernantoj, la laboristoj de la uzinoj kaj aliaj institucioj, kaj la privataj interesiĝantoj. La ĉiutagan programon kompletigas la laboroj de la diversaj fakrondoj kaj la aŭtunaj, resp. printempaj ĵaŭdaj prelego-serioj. La aktivaj grupoj okupiĝas pri la observado de la Luno, planedoj kaj variantaj steloj. En la kadro de Uránia funkcias po ses monatoj jare la demonstra sekcio en la Gellért-monta Citadelo, kie per panoramo-, resp. astronomia teleskopoj tage kaj vespere estas prezentataj surteraj kaj surĉielaj vidindaĵoj. Ni gastigas ĉ. 50.000 vizitantojn jare.

La Budapeŝt-a Uránia iĝis la centro de ĉiuj similaj observatorioj demonstraj. La karakteron de ĉi tiuj observejoj esprimas la nomo „Uránia". *En la lastaj dudek jaroj estiĝis pluraj observatorioj popolkarigaj ankaŭ en la ĉefurbo mem.* En *Csepel* (XXI-a distrikto) 50, en *Újpest* (IV-a distr.) 25, en *Hámán Kató-strata Pionirhejmo* (IX-a distr.) 20, kaj en *Pesterzsébet* (XX-a distr.) 23-cm-an speguldiametron havas la teleskopoj servantaj la popolklarigajn celojn.

Laŭ la Budapeŝt-a ekzemplo sinsekve estiĝis la provincaj demonstraj observatorioj — instalitaj plejparte per 30 cm-aj spegulteleskopoj (reflektoroj). *Tiaj funkcias en la urboj Dunaújváros, Győr, Fűzfőgyártelep, Miskolc, Leninváros, Ózd kaj Szeged.* Krom tiuj en pli ol dudek komitataj

La Observatorio Uránia de la Sciencpopulargia Asocio. En a fono vidiĝas la iama reĝa palaco de Buda

tezidejoj kaj aliaj urboj 15 cm-aj reflektoroj kaj porteblaj -eleskopoj staras je la dispono de la sciencdisvastigo kaj rpopularigo.

La specifa trajto de la hungara amatormovado estas la ege granda nombro de la memfaritaj teleskopoj. La instrumentoj ankaŭ en la menciitaj urboj estas enlandaj, sed la nombro de la seriozaj teleskopoj faritaj de amatoroj superas la milon. La meza diametro de la spegulteleskopoj estas 15 cm-a, sed la amatoroj posedas centojn da reflektoroj ankaŭ kun 20, 25 kaj 30 cm-a speguldiametro.

Grandsignifa estas por la publikeco de la hungara amatormovado la 15 000-opa eldonnombro de la revuo *Föld és Ég*, kaj tio, ke jare ĉ. 3000 popolklarigaj prelegoj estas faritaj ĉie en la lando, Ankaŭ la Hungara Radio kaj Televido dissendas ofte astronomiajn programerojn. Krom tio la Televido jam dufoje prezentis la dupartan filmon: *Hobbym a csillagos ég* (Mia hobio estas la ĉielo astroplena), kiu prezentas parton de la hungaraj amatoroj kaj iliaj instrumentoj. En ĝi rolas intelektuloj, laboristoj, vilaĝanoj kaj lernantoj. Inter la junularo troviĝas minimume dekmil malgrandaj amatoroj, kiuj jam pretigis sian teleskopon malpli koste ol por 20 forintoj. Kaj tiuj, kiuj jam faris teleskopon el okulvitro-lenso, certe ekhavas emon por konstrui ankaŭ pli grandan, pli seriozan spegulteleskopon, per kiu ili jam povas fari science valorajn observadojn. Por la pretigo de amatorinstrumentoj la Amika Rondo donas fakliteraturon kaj ĉiaspecan helpon.

La amatora movado en Hungarujo ne estas nura hobio. En la kadro de la movado ni edukas, klerigas prelegantojn, kiuj helpas la celojn lernejan-instruadan kaj popolklarigan. Ni povas diri ke la Amika Rondo de l'Astronomio entreprenas la plejparton de la instrua kaj kleriga laboro de la astronomia sciencpopularigo. La junuloj edukitaj en ĝiaj fakrondoj disponigas la kompletigan novan generacion por la hungaraj sciencaj astronomiaj institucioj.

Trad. **Aurél Ponori Thewrewk**

Antal Münnich:

Komputado kaj l'estonto de l'Internacia Lingvo

Unua parto

En la mezepoka Eŭropo la sciencistoj kaj ĝenerale la kleruloj verkis ekskluzive latinlingve. La invento de la presado etendis la scion legi kaj skribi al la popolaj amasoj. Gi estus povinta etendi ankaŭ la scion de la latina lingvo. Sed ne tiel okazis: anstataŭ etendi kaj firmigi la lingvan unuecon, la presado frakasis ĝin per la kreo de nacilingvaj literaturoj (sciencaj kaj beletraj).

Se Majstro Gutenberg kaj la presistaj gildoj de l' 15-a kaj 16-a jarcentoj estus decidintaj presi nur latinlingvajn verkojn, tiu lingvo hodiaŭ estus almenaŭ tuteŭropa, eble eĉ tutmonda interkomprenilo. Do, la renesanco kaj frua baroko estis tia epoko, dum kiu *la konduto de ununura grupo da sammetianoj decidis la sorton de l'internacia lingvo.*

Dum la mezaj jaroj de la 20-a jarcento aperis nova inventaĵo, la komputilo, kaŭzonta (eble jam kaŭzanta) same profundan kulturan transformiĝon, kiel siatempe la invento de la presilo. Komence oni ĝenerale kredis ĝin „elektrona kalkulilo", do nur novspeca variaĵo de jam konata aparato. La eraro de ĉi tiu miskredo baldaŭ evidentiĝis, kiam oni ekuzis la komputilojn por solvi nematematikajn problemojn, ekz. lingvosciencajn, ekonomiajn, arĥeologiajn ktp. Oni jam nun povas antaŭdiri, ke dum la sekvontaj jardekoj tiuj sciencaj libroj, juraj dokumentoj, diplomatiaj paktoj, komercaj kontraktoj ktp., kiuj ne estas analizeblaj kaj prilaboreblaj per komputilo, iĝos ĝenerale konsideritaj kiel netaŭgaj kaj neakcepteblaj.

Tekston prilabori per komputilo eblas jam nun, sed nur iom primitive. Dum la sekvontaj jardekoj oni postulos, ke komputilo kapablu verki la enhavo-resumon de scienca artikolo, kaj klasifiki ĝin bibliografie; poste retrovu ĝin laŭ peto de persono serĉanta artikolojn pri la koncerna temo. Oni postulos, ke ĝi ekzamenu la leĝaron de iu lando por trovi en ĝi eventualajn logikajn kontraŭdirojn, kiuj prezentas ŝancon al fijuristo. Se tiaj kontraŭdiroj estas eliminitaj, ĝi povu kompari pakton aŭ kontrakton kun la leĝaro, ĉu ĝi estas laŭleĝa. Patentoj estas limteritorio inter la jura kaj inĝeniera sciencoj, kiun la komputilo devos analizi el ambaŭ vidpunktoj. La uzojn de komputilo por arĥitekturo, sociologio, kaj por aro da aliaj sciencoj, profesioj, kaj metioj ni eĉ ne menciis. Ĉiukaze evidentas, ke komunikilo liganta la homon kun komputilo apartenos al ĉiu skribotablo post kelkaj jardekoj (se la progreson de l'scienco ne interrompos militkatastrofo).

Sed jen grava faktoro. Por ke komputilo povu analizi tekston, la lingvo de tiu teksto devas esti mem analizita laŭ sintaksa kaj semantika vidpunktoj. Lingvo, kiu ne estos analizita kaj esplorita de l'komputistoj, havos nenian ŝancon iĝi ĝenerala interkomprenilo, ĉar tialingvan tekston oni ne povos prilabori per komputilo. Post la invento de la presado, perdis sian gravecon ĉiu lingvo, por kiu oni ne kreis alfabeton, ĉar tialingva teksto ne estas prilaborebla per presilo. La analogio inter la efiko de la du inventaĵoj — presilo kaj komputilo — evidentas.

Ripetiĝas do la situacio de la 15-a kaj 16-a jarcentoj: ree *la sorto de l'internacia lingvo dependas de l'konduto de ununura profesia grupo.* En nia jarcento ĉi tiu grupo estas la komputistaro.

Dum la nuna stagno kaj eĉ malprogreso de Esperanto ĉiun inteligentan samideanon turmentas la demando: ĉu nia lingvo estas pereanta, aŭ ĉu ĝi estas transiranta en la Trian Etapon, la etapon de la tutmonda disvastiĝo?

Ĉi tiu demando povas esti dispartigota je 3 eroj.

1. Ĉu Esperanto taŭgas por perkomputila prilaborado? Ĉu ĝi havas tiurilate avantaĝojn, kompare je aliaj lingvoj?

2. Se ĝi efektive estas taŭga kaj avantaĝa, ĉu ĝi estos akceptata, ekuzata, kaj disvastigata de tiuj komputistoj, kiuj ekkonis ĝiajn taŭgecon kaj avantaĝecon?

3. Ĉu la Esperanto-movado ion faras aŭ faros por konigi Esperanton al komputistoj kaj komputilistoj?

Rilate la unuan demandon, Esperanto devas esti komparata unuflanke je l'naturaj lingvoj, aliflanke je lingvoj artefarotaj speciale por la celo de l'perkomputila prilaborado.

La konsidero de l' naturaj lingvoj povas esti limigota al tiuj, kiuj ŝajnas havi ian ŝancon iĝi internaciaj. Ili estas la angla, ĉina, kaj rusa.

La malavantaĝo de l'angla (el la vidpunkto de la komputisto) estas la fakto, ke la senco kaj eĉ la gramatika kategorio de multaj vortoj tre dependas de la kunteksto. Kaj ĉi tiu ĝena fenomeno plej forte evidentiĝas en la kazo de l'plej ofte uzataj vortoj, ekz. *get, put, have* ktp., kiuj havas plurajn dekojn da signifoj. Kaj oni ne pensu, ke temas nur pri nuancoj. Ekz. *slip* povas signifi *glito* aŭ *gliti, eraro* aŭ *erari,* krome *kravato, peceto* (da papero), *tavolo* (da balenlardo), *fazproktasto* (de elektraj maŝinoj), *lignero* ktp. Ni ne volas listigi la proks. 15 signifojn de *slip* en la mekanika teknologio, nur mencias la kontraston inter „*a slip of a girl*" = maldika knabineto, kaj „*a slip of blubber*" = tavolo da balenlardo. Kompreneble, ĉio ĉi malmulte ĝenas la homojn, kies gepatra lingvo estas la angla. Des pli ĝi ĝenas la programiston, kiu devas efektivigi la perkomputilan pritraktadon de angla teksto. Ne sufiĉas konsulti la enmaŝinan vortaron por trovi la sencon de vorto, oni devas ankaŭ konsideri la aliajn vortojn de l'frazo. Eĉ tio ne ĉiam sufiĉas. „*Pray, said the minister*" povas esti tradukata „Preĝu, diris la pastoro" aŭ „Mi demandas, diris la ministro". Homo elektus la ĝustan el

ambaŭ sencoj per rigardo al la najbaraj frazoj: ĉu la sceno situas en preĝejo aŭ en parlamentejo? Principe ankaŭ komputa programo povus tiel elekti. Sed ju pli multaj vortoj devas esti konsiderataj por trovi la signifon de unu vorto, des pli malrapida kaj des pli multekosta iĝos la komputado.

La ĉina lingvo havas la saman malavantaĝon, sed malpli akre, ol la angla. Kvankam ankaŭ la ĉinaj vortoj ofte havas multajn signifojn, ĝenerale la vorto antaŭa determinas la signifon de la posta. Tio rezultigas programon pli simplan, ol la nereguleco de l'angla. Tamen eĉ tiu programo estus multe pli longa kaj multekosta, ol programo por la analizo de teksto en lingvo, en kiu la signifo de ĉiu vorto estas nedependa de la ĉirkaŭantaj vortoj. Sed la ĉina lingvo havas alian, pli gravan malavantaĝon por la komputilisto: li devas provizi la maŝinon per iloj por enigi kaj eligi alfabeton konsistantan el miloj da grafikaj simboloj.

Ĉu oni ne povus elimini ĉi tiun malavantaĝon per la uzo de la latina aŭ de la cirila alfabeto por la ĉina lingvo? Bedaŭrinde ne. Unueca ĉina lingvo ekzistas nur skribe. La ĉinoj parolas dekojn da ĉinaj lingvoj, kiuj tiom malsimilas unu al la alia, kiom ekz. la norvega kaj la itala. Norda kaj suda ĉinoj, se ambaŭ konas nur sian gepatran lingvon, ne povas interparoli. Sed ili povas skribe komunikiĝi: la ideografian skribon ambaŭ legas en sia propra lingvo, kiel eŭropanoj la numerojn kaj la aritmetikajn simbolojn +, −, =, ktp. Ĉi tiu ideoskribo do estas tre utila por homa uzo, ĝis ekestos internacia lingvo, sed ĝi konsternas la komputil-inĝenieron.

Fine ni konsideru la lingvogrupon, kies ano estas la rusa, sed al kiu apartenas ankaŭ la germana kaj ĉiuj latinidaj lingvoj. Ilia karakteriza trajto estas la fleksiado. El la vidpunkto de l'komputil-programisto tio signifas, ke ne sufiĉas provizi la maŝinon per radikvortaro. Oni aŭ devas meti en la vortaron krom la radikoj ankaŭ la fleksiatajn formojn de l'vortoj, aŭ devas provizi la tekstanalizan programon per la morfologiaj reguloj por konstrui la fleksiatajn formojn. Ambaŭ alternativoj kostas tempon, konsekvence ankaŭ monon. Je l'unua kazo la tempo bezonata por traserĉi vortaron eble dekobliĝas, je la dua la tempo de la vortanalizo ampleksiĝas per la tempo de l'aplikado de la malsimpla morfologia regularo unufoje *por ĉiu vorto*. La uzo de granda, moderna komputilo kostas po kelkcent dolarojn minute; do tre efektive „tempo estas mono".

(Ni nur parenteze mencias, ke ankaŭ la angla lingvo enhavas kelkajn fleksiajn vortelementojn, sed ni tion ne alkalkulis al ĝiaj malavantaĝoj, ĉar la fleksiemo de la nuntempa angla lingvo estas neglektebla kompare je la fleksiemo de l'rusa, germana, franca ktp. lingvoj.)

(Daŭrigota)

Dum Via vojaĝo en Hungario certigas Vian komforton

EN STACIDOMOJ
restoracio, bufedo, nutraĵ-pavilono
EN TRAJNOJ
litvagono, restoracivagono, bufedvagono
EN ŜIPOJ
restoracio, bufedo
EN LONGDISTANCAJ AŬTOBUSOJ
bufedo

Favorpreze certigas la manĝigadon de turistaj grupoj la Pasaĝerproviza Entrepreno. Informojn donas kaj laŭdezire skribitan informilon sendas la Pasaĝerproviza Entrepreno Budapest V., Veres Pálné u. 24 Telefono: 189—900/160

Arnold Gross

Animkapta ĉarmo kaj sorĉa fabel-atmosfero regas en la akvofortoj, sur la linoleum-folioj de Gross. Sur liaj grafikaĵoj ĉio humaniĝas: homvizaĝon ricevas la floroj, heliantoj, la suno, la luno kaj la steloj. Per fabel-estaĵoj li popolumas la mondon de siaj strangaj homoj. Kvankam ĉi tiuj grafikaĵ-folioj naskiĝas en la nunaj jaroj, ni povas trovi sur ili aerŝipon, vaporŝipon kaj multajn lokomotivojn el la pasinta jarcento. Ankaŭ la loĝejo kaj ateliero de la artisto estas plena de malgrandaj ludlokomotivoj kaj vagonoj, per kiuj kelkfoje li volonte komencas dummeditan ludon. Arnold Gross estas la pleja rakontanto de nia nuna grafikarto. Lia mondo estas stranga, sed interesa, tre ĉarma kaj simpatia.

La kvardek-jara artisto akiris jam multajn belajn sukcesojn en- kaj eksterlande: partoprenon en internaciaj ekspozicioj, premiojn kaj ordenojn, aprecon de kolegoj, interesiĝon kaj sinceran amon de la kompetenta publiko. — **gm** —

Ĝardeno de l'artistoj. (Fragmento) →

KOMENIUS

Antaŭ kelkaj monatoj la tuta kulturmondo honore memoris la tricentan datrevenon de la morto de l'granda ĉeha scienculo, filozofo kaj pedagogo *Jan Amos Komensky*, latinigite *Comenius*. Li apartenas al la tuta mondo, precipe al la adeptaro de la Lingvo Internacia, kies plej grava pioniro li estis siatempe. Certe, unuavice li estas la fiero de la ĉeĥa popolo.

Tamen, ankaŭ la hungaroj povas lin rigardi kelkagrade kiel la sian. El du motivoj.

La granda homar-instruanto, maljuniĝinte, komencis dediĉi sian novan verkon jene: „Al mia kara patrino, al la tero de la moravianoj dediĉas tiun ĉi verkon unu el ĝiaj fidelaj filoj, Jan Amos Ko . . ." Sed tiam lia mano haltis. Poste li trastrekis la lastajn du literojn kaj skribis plu: „*Szeges* el Nivnicé, nomata laŭ sia patro Komensky".

La volumo surhavanta la dediĉvortojn longe vagadis. Ĉeĥdevena scienculino *Blekastad* ĝin studadis lastatempe! kaj trovis la ĝis tiam ne menciitan nomon *Szeges*. Anton *Skarka*, profesoro de la Karlo-universitato en Praha, povis konstati, ke tiu skribo de Komenius okazis la 31-an de marto 1670, do iom antaŭ lia morto. Tiun konfeson do li faris en sia vivadiaŭa lasta emocio.

Postaj esploroj malkovris, ke la patro de Komenius estis Martin, kaj lia origina nomo estis *Szeges* (hungare: Najlisto). La familio devenis el hungaraj enmigrantoj al Moravio; tiuregione *Uhersky Brod* (= Hungara Brod) kaj aliaj lokoj kun la nomo „*uhersky*" atestas pri tiu enmigro. Profesoro *Skarka* dokumentis, ke pastoro de Brod korespondis kun konata hungara pastoro Melius-Juhász, kaj en siaj leteroj menciis ankaŭ la tiuregione vivantan familion *Szeges*. Oni scias ankaŭ pri du pastoroj nomataj *Szeges* kaj vivintaj en Hungarlando, al kiuj Komenius sendis monhelpon en 1647. *Komna*, de kie originas la nomo de Komensky-Komenius, estis vilaĝo proksime al *Uhersky Brod*.

La dua cirkonstanco, liginta la scienculon al Hungarlando, estis tio, ke li, devigite fuĝi el sia patrujo, post multa ĵetiĝado (Pollando, Britujo, Svedlando) kvar jarojn (1650—1654) laboris en la hungarlanda *Sárospatak*, kien lin invitigis Susana *Lorántffy*. Tie li faris grandan planon pri la evoluigo de la tiea kolegio sub la titolo „Illustris Patakianae scholae idea" kaj verkis ankaŭ lernolibrojn. Lia espero estis, ke tie li povos realigi sian revon: la „schola pansophica". Tie li verkis sian „Orbis pictus", lernolibron, kiu ĉion sensebligas per bildoj. Tie pretiĝis ankaŭ lia studo „Gentis felicitas", en kiu li skribas pri la vivo kaj cirkonstancoj de la hungara popolo. Li bone sciis la hungaran lingvon: sur kvarlingvaj ilustritaj paĝoj de lia studo la tria lingvo estas la hungara. En la nomita verko li verkas pri la hungaraj virtoj kaj pekoj kaj dolore kunsentas la suferojn de la lando en la mortiga brakumo turka kaj Habsburga. „Mi amas vin kun eterna amo" — li skribas al la hungara lando. Menciinde, ke li skribis ankaŭ pri la komunaj trajtoj de la hungara kaj finna lingvoj. En liaj leteroj skribitaj en Sárospatak ripete oni povas legi: „ĉe ni, hungaroj kaj moravianoj".

La granda scienculo, longe vaginta senpatruje, ligis sin definitive al la ĉeĥa-morava popolo, sed la hungaroj pie memoras lian vivon, agadon, instruadon kaj lian amon ankaŭ al la hungara popolo. Lia nobla personeco, interkroĉinte per si du popolojn, fortikigas per tio la amikajn-fratajn rilatojn inter la du gentoj kaj instigas por sento de paca interaparteno kun ĉiuj landoj, kie vivis, verkis kaj instruis Jan Amos Komensky-Szeges.

P. B.

CINEMATOGRAF

György Radó

Pri la Esperanta tradukarto en la finn-ugra kongreso

La finn—ugra kongreso, kiu tenis sian kunsidon en Aŭgusto 1970 en TALLINN, ĉefurbo de Sovet-Estonio, kaj kiun partoprenis proksimume 500 fakuloj kunvenintaj el la tuta mondo, — estis jam la tria en la vico de tiaspecaj kunvenoj: la unua kunsidis en Budapeŝto (1960), la dua en Helsinki (1965). La finn-ugra esplorlaboro signifas hodiaŭ jam pli ol la studadon de lingvoj el tiu ĉi lingvofamilio. Ĝi etendiĝas komplekse al pluraj brancoj de la sciencoj kaj artoj, kaj en TALLINN, krom la lingvistoj, tenis kaj aŭskultis prelegadojn eĉ historiistoj, literaturhistoriistoj, etnografoj, antropologoj, muzikologoj ktp. Mi mem elektis je peto de la aranĝkomisiono tradukteorian temon, kaj ĉar mi okupiĝis ankaŭ pli frue pri la naciaj eposoj de la finnoj kaj estonoj, pri *Kalevala* kaj *Kalevipoeg*, nun mi volis kompari la diverslingvajn tradukojn de tiuj du verkoj.

Mi ne prepariĝis pri histori-karaktera prelegado, mi ne volis surmapigi ĉiujn tradukojn de la du verkoj (mi ja ne povintus paroli pri la plurdekaj tradukoj en kadro de dudekminuta prelegado), sed mi elektis la metodologian alproksimigon: kiel kaj per kiaj metodoj, malsamaj unu de la alia, provis realigi kreantoj de kelkaj pli interesaj kaj signifaj tradukaĵoj la bazan celon de la arttradukistoj, la *artisme fidelan* interpretadon.

Mi kolektis kelke da tekstoj alireblaj en la Budapeŝtaj bibliotektoj — germanan, francan, anglan, rusan kaj nature ankaŭ hungaran tradukojn — kaj interesis min, ĉu ekzistas E-lingva traduko de la du eposoj. Helpe de ŝuldiga afableco de d-ro Kálmán Kalocsay mi eksciis, ke *Kalevala* aperis Esperante en plena teksto kaj kelkaj detaloj de *Kalevipoeg* en antologio.

Mi havigis al mi ankaŭ la tekstojn. La tradukisto de *Kalevala* estas Joh. Edv. Leppäkoski, la teksto aperis en tre luksa eldono kun ilustraĵoj de granda finna artisto Akseli Gallen-Kallela. La verkon eldonis Fondumo-Esperanto en Helsinki (1964) kaj ĝian signifon levas ankoraŭ tio, ke sur la interna titolpaĝo estas legebla: Serio Oriento-Okcidento n-ro 4, sub Aŭspicioj de UEA en Konsultaj Rilatoj kun UNESCO. *Kalevipoeg* aperis pli modeste: cent ses versojn de la tria kanto (Runo) de la eposo, tradukitaj de Hilda Dresen; publikigis Esperanto-Asocio de Estonio en TALLINN (1932) kiel la unuan eldonaĵon de serio planita por pluraj kajeroj.

Kiam poste la kolektitajn diverslingvajn tekstojn mi komparis kun la originalaj versaĵoj el vidpunkto de tradukistaj metodoj, mi venis al surpriza rezulto: la du esperantistaj tradukistoj alproksimigis plej bone la idealan normon de arttraduko.

Ĉar la normoj de la arttraduko estas kodigitaj nenie, mi devas nun diri, kion mi nomas ideala normo. El inter la enhavaj, formaj kaj eventuale aliaj etosaj elementoj de la originala verko ne eblas ĉiujn trans-

Kalevala-detalo, la originala kaj la E-traduko de Leppäkoski

Kasvoi tammi tanhualla,
Puu pitkä pihan perällä,
Tammessa tasaiset oksat,
Joka oksalla omena,
Omenalla kulta-pyörä,
Kulta-pyörälle käkönen.
Kun käki kukahtelevi,
Sanoin viisi virkkelevi,
Kulta suusta kumpuavi,
Hopea valahteavi
Kultaiselle kunnahalle,
Hope iselle mäelle;
Siitä naulat kantelehen,
Wääntimet visaperähän.

Granda kverko kampe kreskas,
longa arbo kortofone,
havas helajn, brilajn brancojn,
ĉiu branĉo portas pomon,
ĉiu pomo oran kronon,
ĉiu krono orkukolon.
Kiam la kukoloj kantas,
birdoj de feliĉ' kukuas,
oro el la buŝo gutas,
fluo de arĝent' fontanas,
rulas sin sur ordeklivon,
sur arĝentan altaĵeton:
jen por la kantelaj kordoj
estos najloj kaj streĉiloj.
(44. kanto, 183—196. versoj)

Kalevipoeg-detalo, la originala kaj la E-teksto de Hilda Dresen

Kalevi pojad kolmekeste
Kõndisivad lustikäiki,
Mööda rõõmuradasida,
Käisid mööda lagedada,
Mööda nõmme nõtkandile,
Mööda sooda sõtkütile
Seal tuli vasta neli metsa,
Neli saledad salkusi.
Üks oli kulla kuusemetsa
Teine tarka tammemetsa,
Kolmas kena kasemetsa,
Neljas leske lepametsa.

Kune la Kalevidoj karaj
Nun triope triumfadis,
Ridetante rapidiris,
Laŭ vastegaj valoj vagis,
Laŭ paŝtetoj pacaj paŝis,
Laŭ marĉetoj muskaj marŝis;
Kreskis survoje kvar arbaroj,
Kvar gracie belaj boskoj.
Estis jen pompa picearo,
Kaj klerega kverkarbaro,
Belaspekta betularo,
Larmabunda alnarbaro.
(3. kanto, 435—446. versoj)

planti en alian lingvon. La arto de la tradukisto estas parte la rekono de tio, kiuj kaj en kia vicordo el la menciitaj elementoj estas la esencaj kaj gravaj, aliparte la proporcia *reprodukto* de la ekkonitaj elementoj laŭ ilia graveco, mallonge: la interpretado de la *komuna maksimumo* de la diversaj elementoj en la alia lingvo.

Dum mia analizado mi trovis, ke la enhavelementojn de *Kalevala* kaj *Kalevipoeg* ĉiuj tradukistoj, interpretis ĝenerale bone, fidele kaj bele, — sed koncerne la formoelementojn, precipe la aliteraciojn estis tre malsamaj iliaj opinioj kaj solvoj. Sed ja tiuj ĉi, la oftaj konsonancoj de la vortkomencaj literoj tiom karakterizas la du eposojn, tiagrade apartenas al ilia specifa etoso, ke sen ili la traduko povas esti nur stumpa, mankhava. Kaj tamen ekzistis tradukistoj de la du eposoj, kiuj simple ignoris la aliteraciojn. Moderna amerika filologo-tradukisto Francis Peabody Magoun Jr en siaj komentarioj konsideras rekte eraro la reprodukton de tiu ĉi formoelemento, ĉar tio igus monotona la tradukon kaj malpliigus la eblon de elekto de la enhave konvenaj vortoj. Du rusaj tradukistoj Deržavin kaj Kočetkov eĉ diras malebla la reprodukton de la aliteracioj.

La refuton de tiuj ĉi opinioj donas ne nur la ofte kaj kun plena forto eksonantaj aliteracioj en la hindo-ĝermanaj poezioj, sed unuavice la Esperanto-tradukoj de la du eposoj. Hilda Dresen kaj Joh. Edv. Leppäkoski kun mirinda artisma fideleco aplikis tiun formoelementon en siaj tekstoj, pruvante samtempe la elstarajn eblecojn kaj elastecon de la E-versfarado.

Kaj nun mi nur notas, ke kontraŭ la tradukistoj neantaj la aliteracion, la hungaraj interpretistoj de la du eposoj falis en la malan ekstremon: Béla Vikár le eposon *Kalevala* kaj Aladár Bán *Kalevipoeg*-on provizis krom la aliteracioj eĉ kun versfinaj rimoj mankantaj en la originaloj . . . Kvankam diference de la originalo, tamen ili sukcesis tiamaniere krei tian popularan etoson (kion pruvas la novaj eldonoj kaj la granda teatra sukceso de *Kalevala)*, ke ni povas deziri nur similan sukceson al ĉiuj tradukoj en ilia patrujo . . .

Kaj la du E-tradukojn mi prezentis kiel imitindajn ekzemplojn en la TALLINNA-a finn-ugra kongreso.

Tradukis: **Jozefo Mátéffy**

Internacia exlibris-kongreso en Budapeŝto

En la novembro de 1969 oni tenis en Budapeŝto la 13-an exlibris-kongreson; partoprenis kolektantoj el 15 landoj de Eŭropo. En la kvartaga kongreso, krom la oficialaj kunsidoj, la partopenantoj povis vidi tri grandajn exlibris-ekspoziciojn, ekskursi al Visegrád kaj Eger (kun bona hungareska tagmanĝo), adiaŭi bankede en la plej eleganta restoracio de la ĉefurbo. La plej alloga por la kolektantoj estis la eminenta okazo de interŝanĝado. Laŭ la opinio de la gastoj la kongreso superis eĉ la grandsukcesan kongreson en Como en 1968. Ĝojiga surprizo estis al la gastoj la donaco de la hungara aranĝantaro: tri belaj exlibris-mapoj kaj la noblagusta kongres-katalogo. La laboron de la gastigantoj la registaro helpis per subteno de 300 000 forintoj.



El la artistoj partoprenantaj en la Internacia Exlibris-Ekspozicio, en kvin kategorioj 13 ricevis premion. Unuan premion gajnis en la kategorio „Budapest" *Anatoli Kuznecov* (Sovetunio), en la kategorio „In memoriam Béla Bartók" *Lenke Diskay* (Hungarlando), en la kategorio „Dürer" *Dora Maurer* (Hungarlando), en la kategorio „Vinbero kaj vino" *Korolko Malgorzata* (Pollando). La premion de la Ŝtata Termastrumejo de Eger oni aljuĝis al *Anatoli Kolasnikov* (Sovetunio).

La sekvanta kongreso okazos, se Danlando surprenos ĝian organizon, en Kopenhago en 1972.

— **gm** —

Esperanto en Hungario

1950-1960

La ,,granda silento'' tamen ne estis kompleta.

,,Leginte la protokolon de la komitatkunsido de Hungarlanda Esperanto-Societo, okazinta la 6-an de aprilo 1950, ni konstatas, ke la kunsidon ĉeestis 15 el la 17 membroj. La proponon, laŭ kiu ,,la Esperanto-Societo provizore interrompu sian agadon'', akceptis 10 membroj . . . kontraŭ la propono voĉdonis 3 membroj, sin detenis 2 membroj.'' Hungara Esperantisto, 1967/2., p. 15).

Estas evidente, ke tiu ĉi decido ne malpermesis ankaŭ la personan uzadon de Esperanto. Kaj fakte — dum tiuj kvin jaroj: 1950—55, multaj konsciaj adeptoj plu uzis la Lingvon Internacian, multaj eĉ korespondis kun eksterlandanoj. En du aŭ tri provincaj mezlernejoj daŭris iom da tempo la instruado de Esperanto en kursetoj. Prof. *Lajos Király* en Miskolc restis seninterrompe delegito de UEA, unusola en tiu ĉi periodo.

,,Ni devas konstati — ni citas ankoraŭ el H. E.-isto — ke ekde 1950 ne nur en Hungarlando, sed ankaŭ en aliaj orientaj landoj ,,silentis'' la Esperanto-movado, la Esperanto-organizaĵoj ne funkciis, provizore ĉesigis sian agadon. Sed tio estis ja dependaĵo de tiamaj politikaj konsideroj, kaj ne estus juste respondecigi pro tio iujn aŭ aliajn esperantistojn.''

Inter la hungaraj adeptoj de Esperanto estis ankaŭ tiam grandnombre socialistoj, komunistoj, kiuj staris fortike sur siaj piedoj, kaj samtempe nur malmultaj kredis la neoficialajn fabelojn, ke pro la kolosaj laboroj de la rekonstruo oni devas ĉesigi ĝuste la Esperanto-agadon, kaj ne ekz. la tenisludon. Ĉu iuj esperantistoj eble timzorgis pri sia propra sekureco? Tio povis okazi, tamen fakto estas, ke neniu en Hungario suferis areston, punon, elpostenigon ktp., ĉar li parolis aŭ korespondis Esperante.

En 1955 montriĝis diversaj signoj de la mildiĝo en la publika vivo. Printempe de 1955 en urbo Hódmezővásárhely kunvenis konferenceto, kiu ekzamenis: ĉu alvenis la tempo denove komenci la movadon de Esperanto? En majo en Budapeŝta ekskursloko ,,Friska Valo'' estis amika priparolado. Kaj post tri monatoj, la 4-an de aŭgusto 1955 en la Engelsplaca kulturdomo fondiĝis Esperanto-grupo sub prezido de *Maria Kenesei*.

Jam en decembro 1955 pretiĝis memorando por la Hungara Laborula Partio. La partio en julio 1956 akceptis kaj rekonis tiun deziron de la hungaraj esperantistoj, ke Esperanton oni devas utiligi por la paco kaj por la hungara patrujo. La inspekta instanco fariĝis la Ministerio de Popolklerigo, kaj la Landa Esperanto Konsilantaro estis nomata kiel reprezentanto de la hungara movado. Ĝi gvidas la tutlandan movadon, organizas kursojn, fakrondojn en kadro de la kulturhejmoj, ĝi rajtas eldoni gazeton, librojn ktp. kaj akceli la plifortigon de la rilatoj kun la laborantoj de la popoldemokrataj kaj kapitalistaj landoj.

Sub freŝa kaj konscia gvidado de la Konsilantaro Esperanto reprenis preskaŭ tute sian antaŭan pozicion. La ĉefa organizanto estis *d-ro Lajos Márton*, kiu agadis energie. Prezidanto de la organizaĵo fariĝis *Julio Baghy*, kies aŭtoritato kontribuis utile al la laboro. En la estraro laboris efike *P. Balkányi, d-ro I. Ferenczy* (Győr), *P. Gulyás, d-ro J. Mátéffy, I. P. Nolipa, G. Sulyán, Borbála Szerémi*, poste ankaŭ *d-ro I. Nagy*. Aparte ni menciu profesoron *Lajos Domokos*, kiu kiel anstataŭa ĉefsekciestro de la ministerio subskribis la dekreton pri la organizaĵo, kiu ministeria dekreto signifis oficialan rekonon ne nur de la Konsilantaro, sed ankaŭ tiun de Esperanto mem.

Krome ni emfazas gravan rolon de *Mondpaca Esperanto-Movado* — MEM, — ĉe renaskiĝo de la hungara movado. MEM plej konsekvence batalis por la paco, forĵetinte ĉiun nebulan ideon konekse kun Esperanto. Al MEM aliĝis iom post iom pli multaj pacbatalantoj, kaj la unua hungara numero de la revuo ,,Paco'', organo de MEM, aperis en aŭgusto 1956. Ĝi estis la unua presita esperantlingva presaĵo ekde ses jaroj en nia lando; la eldonon de tiu ĉi numero ebligis ĉefe *Imre Tombácz*, multmerita batalanto de la laborista kaj Esperanto-movado en Szeged.

La konsilantaro laboris laŭplane kaj diligente. Krom la oficiala delegito de la hungara registaro, prof. Lajos Domokos, kvarmembra deputacio reprezentis la hungaran Esperanto-movadon en la Universala Kongreso en Kopenhago, en 1956.

Baldaŭ post tiu ĉi kongreso, la 19—20-an de aŭgusto traktadis en la ĉefurbo Landa Esperanto Renkontiĝo. Laŭ la ĉefsekretaria raporto tiutempe jam funkciis en la lando 24 fakrondoj, el ili 21 en kulturhejmoj. Lajos Domokos faris instigan parolon nome de la Kleriga Ministerio. ,,La hungaraj esperantistoj — li diris — faru ĉion eblan por la paco, krome ili konigu diversmaniere, ke la hungara laboranta popolo atingis dum la pasintaj 11 jaroj treege gravajn sukcesojn.''

Ankaŭ la *fervojista* Esperanto-movado daŭrigis sian laboron. La fervojistoj faris multe precipe en la urbo Miskolc. En 1957 fondiĝis la Centra Fervojista Esperanto-grupo en la Ministerio de Trafiko kaj Poŝto, kaj ankaŭ samjare aperis la kvaronjara ilustrita revuo *Hungara Fervojista Mondo*. La gvidanto de tiu ĉi grava faka laboro estis *d-ro István Bácskai*.

La jaro 1957 montris pluan evoluadon en la hungara movado. La Konsilantaro ricevis ŝtatan subvencion, propran ejon en la centro de la ĉefurbo. Krome la registaro donis eblon por poŝtmandati la asocian membrokotizon al UEA, kaj la ministerio por klerigaj aferoj donacis kopion de sonfilmo ,,Ili bezonas pacon!'' al UEA. En 1957 estis aranĝitaj tri teritoriaj renkontiĝoj: en Budapeŝto, en Szeged kaj en Miskolc. Salutinda iniciato estis, ke sepmembra delegitaro partoprenis la Esperanto-renkontiĝon dum la *VI-a Junulara Festivalo en Moskvo*. Sur la kultura kampo estis grava la eldono de *Esperanto-poŝtmarko* okaze de la 70-a datreveno de naskiĝo de la Lingvo Internacia.

En 1958 la ŝtata subvencio refoje certigis la financan bazon al la bona

laboro. Aperis ĉ. 430 informoj kaj ĉ. 50 artikoloj pri la en- kaj eksterlanda movado en 28 gazetoj. En la hungarlingva eldono de „Junularo de l'-Mondo", oficiala organo de *Tutmonda Federacio de Demokrata Junularo*, estis konstanta rubriko de Esperanto. En 1958 la Konsilantaro havis 900 (en 1957 600) membrojn. Funkciis 76 rondoj, en 1957 nur 44. Ankaŭ en tiu ĉi jaro okazis teritoriaj renkontiĝoj, en Orosháza kaj en Eger. La fortiĝanta rilato kun la *Hungara Packonsilantaro* ebligis denove la eldonon de hungara numero de „Paco". Kiel raporto de la estraro fiksas: „La hungara movado grave evoluis, la malnovaj esperantistoj denove revigliĝis. Ok membroj — eminentaj politikistoj kaj scienculoj aliĝis al la Patrona Komitato de la Jubilea Zamenhof-jaro."

Kaj kion faris niaj verkistoj dum tiu ĉi periodo? — vi povas demandi. *Julio Baghy* en 1958 eldonigis sian triaktan lirikan komedion „Sonĝe sub pomarbo", kiu estas unu el liaj ĉefverkoj. Post du jaroj eliris lia novelaro „Koloroj" en Pollando. En 1959 aperis lia kompleta lernolibro, kiu de tiam atingis sep eldonojn. De *Kálmán Kalocsay* presiĝis en 1956 en Danlando la libro „Ezopa Saĝo" — „kun majstra arto kaj art-ekonomio". En la sekva jaro eldoniĝis la poemaro de Baudelaire „La floroj de l'malbono". La ĉefaj tradukistoj estis Kalocsay kaj Waringhien. De nia satiristo *Sándor Szathmári* en 1958 aperis en hungara traduko la E.-lingva romano de Cezaro Rosetti „Kredu min, Sinjorino". Utilega kontribuaĵo al nia praktika lingvistiko estas la hungara-esperanto vortaroj de *prof. A. Pechan*, aperintaj ĝis nun en po kvar eldonoj, la unua en 1958. La Konsilantaro aperigis sian bultenon (ĝis fino de 1959) hektografitan.

Ampleksa laborado: organizo kaj vizito de grupoj, konstanta sciigo de la hungaraj gazetoj, informado de eksterlandaj gazetoj, patronado de la Ekzamena Komitato, intima kunlaboro kun la pacmovado kaj aliaj sociaj movadoj, agado por la fremdultrafiko, prizorgo de la junulara sekcio, helpo al la blindula grupo, rememoro pri niaj naciaj festoj — kaj multaj aliaj taskoj apartenis al la vasta agadsfero de la Konsilantaro.

Ludoviko Kökény

D-ro István Szerdahelyi

Progresiva paŝo en nia movada historio

Kvinlanda Pedagogia-Didaktika Eksperimento pri la oficiala enkonduko de Esperanto en lernejojn 1971/72—1973/74

La III-a Kunordiga Konferenco por Enkonduko de Esperanto en lernejojn, okazinta en Maribor (Jugoslavio) de la 27-a ĝis la 29-a de marto 1970, en la kadro de Internacia Jaro de Edukado 1970, proklamita de UNESKO, sub la aŭspicio de S-ro Slavko BOHANEC, sekretario pri kulturo kaj klerigo de SR Slovenio akceptis konkludojn, kies efiko povas havi nunmomente ankoraŭ neantaŭvideblan influon sur la estontan evoluadon de la tuta movado.

Eble la plej granda signifo de la konferenco estas, ke ĝin oficiale partoprenis ne nur la 42 reprezentantoj de Esperanto-movado el Aŭstrio, Bulgario, Hungario, Italio kaj Jugoslavio, sed ankaŭ la reprezentantoj de la Klerigaj Ministerioj de ŝtatoj-membroj, invititaj diplomatie. Nur Italio ne havis ministerian reprezentanton, sed S-ro Luigi RUSSO, la prezidanto de la Komisiono por publika instruado kaj belartoj de la Senato de Respubliko Italio esprimis skribe sian intereson por la laboro de la Konferenco, ne povante ĝin ĉeesti pro la troa okupiteco.

La Konkludojn de la Konferenco, pro ilia gravega signifo, ni citas laŭvorte:

1. La Lernejaj Komisionoj de Ŝtatoj-Membroj klopodu krei konstantan kontakton kun la superaj oficialaj organoj kompetentaj pri la enkonduko de Esperanto en lernejojn.

2. Surbaze de la raportoj, faritaj de unuopaj landaj lernejaj komisionoj, la Konferenco instigas al la daŭrigo de instruado en ĝisnunaj formoj, kaj kun la celo de plua evoluigo de Esperanto-instruado proponas al kompetentaj lernejaj instancoj de Ŝtatoj-Membroj enkonduki eksperimente devigan instruadon de Esperanto en difinitan nombron da lernejoj. Estus konsilinde, ke la instruado de Esperanto komenciĝu post 4 jaroj de la elementa lerneja studado kaj ke ĝi daŭru minimume tri jarojn.

3. La Konferenco komisias la fakan gvidadon de la eksperimenta deviga instruado de Esperanto en lernejoj al la Esperanto-fako de la Scienca Universitato EÖTVÖS Lóránd en Budapest kaj ŝarĝas la fakestron organizi laborgrupon el la fakaj reprezentantoj de la unuopaj Lernejaj Komisionoj.

La tasko de la laborgrupo estas:

a) prepari necesan bazan dokumentaron (instruprojekto, kompleksa didaktika minimumo, instrumetodaj rekomendoj k. s.);

b) fake gvidi kaj sekvi la fluon de la eksperimento kaj raporti pri la fakaj konkludoj de la eksperimento.

4. La Konferenco fondas sian informan servon por interna reciproka informado de la Lernejaj Komisionoj kun sidejo ĉe la Konstanta Organiza Komitato en Maribor.

5. Por demonstri la praktikan valoron de Esperanto-instruado en lernejoj, la Konferenco komisias al Bulgara Lerneja Komisiono organizi laborgrupon, kiu helpu en tiu laboro (korespondado, renkontiĝoj, ekskursoj, ekspozicioj, kultur-artaj aktivecoj k. s.).

6. Por kunhelpi la realigon de tiuj taskoj la Konferenco decidas sendi — por informo — la materialon de la tria Konferenco al la invititaj oficialaj instancoj.

La protokolon subskribis: Prezidanto de la Konferenco, D-ro I. Szerdahelyi, Prezidanto de Aŭstria Lerneja Komisiono (LK) J. Wesian, Repre-

zentanto de Bulgara LK Kunĉo Válev, Prezidantino de Hungara LK. Emilia Radvánszky, Prezidanto de Itala LK D-ro Mario Dazzini kaj la Prezidanto de Jugoslavia LK D-ro Peter Zlatnar.

La antaŭpreparaj laboroj

Post la konferenco la kvin landoj-membroj elektis la landajn respondeculojn pri la eksperimento. Ilia tasko estus, kunsente kun la oficialaj instancoj de siaj landoj, elekti tiujn lernejojn, kie estas taŭgaj kondiĉoj por okazigi la eksperimenton, nome: organizi eksperimentan klason kun deviga Esperanto-instruado kaj paralelan kontrolan klason, en kiu oni instruas alian fremdan lingvon laŭ la samaj kondiĉoj.

Ni proponas por la unua lernojaro 5 lernejojn. Kaj la instruontoj kaj la lernontoj kreos jam dum la unua lernojaro intensivan interrilaton multflankan inter si, kaj inter la alilandaj lernejoj partoprenontaj en la eksperimento.

La baza principo estas, ke interrilatiĝas ne lernantoj kun lernantoj, sed lernejoj (klasoj) kun lernejoj (klasoj). Tiamaniere, la instruistoj povas ŝanĝi spertojn, la lernantoj povas interkonatiĝi, povas kolekti materialon por ekspozicioj, organizi komunan tendaron, ŝanĝ-vizitojn ktp. demonstrante la praktikan valoron de la Internacia Lingvo.

Post ĉiu eksperimenta lernojaro ni intencas aranĝi Internacian Lernejon ĉiam en alia Membro-Lando. La IL-on partoprenos po 4 lernantoj el la unuopaj lernejoj, do 20 lernantoj el la unuopaj landoj kun 5 pedagogoj, entute 100 lernantoj kaj 25 pedagogoj. Dum la Internacia Lernejo okazos instruado en internaciaj klasoj (po 20 gelernantoj el la 5 landoj ($5 \times 4 = 20$) kun alternative instruantaj pedagogoj, ĉiam el alia lando. Samtempe, la pedagogoj ĉi-okaze ricevos didaktikan pliperfektigon kaj je la fino de la Eksperimento faros la Internacian Pedagogan Ekzamenon de ILEI. Dum la Internacia Lernejo ni daŭrigos la diversajn eksperimentojn kaj mezuradojn kaj estos invititaj partopreni kaj observi la laboron ankaŭ la reprezentantoj de la ministerioj.

Baza dokumentaro

1. Jam pretiĝis kaj aperis multobligite la baza Didaktika Morfemaro entenanta la morfemojn laŭ ofteco kaj alfabetorde por la 3-jara ciklo.

2. Laŭ la decido de ILEI konferenco, dum la eksperimento estos uzota unuece la lernolibro ESPERANTO/1. Surbaze de tiu lernolibro jam pretiĝis la detale ellaborita morfemaro laŭ:

a) lernojaroj
b) lecionoj kaj studhoroj
c) tematiko.

3. Estas pretaj la detalaj instruprogramo kaj instruplano por la unua lernojaro kaj la perspektiva instruplano por la sekvaj du jaroj.

4. Pretiĝas la detala instrumetoda ellaborado de la unuopaj lecionoj, kiu entenos la aplikotan metodon, la uzeblajn instruhelpilojn, la konkretajn celojn pedagogian kaj praktikan de unuopaj studhoroj ktp.

Dum la planado ni devis priobservi la fakton, ke malgraŭ ĉiu klopodo krei similajn unuecajn kondiĉojn, tamen, en diversaj landoj kaj lernejoj la kondiĉoj estos malsamaj (ekz. laŭ la gepatra lingvo de la lernantoj, laŭ la aĝo ktp.) Pro tio, ni ellaboris 4 apartajn dokumentojn kaj komisias al la instruonto elekti la plej konvenan el inter ili.

La kvanto de finendaj lecionoj dum la unua studjaro

Lernejo tipo A (du studhoroj semajne, lernantoj pli junaj): 6 lecionoj; Lernejo tipo C (du studhoroj semajne, lernantoj pli aĝaj): 9 lecionoj; Lernejo tipo B (samaj lernantoj, kiel A, 3 studhoroj semajne): 9 lecionoj; Lernejo tipo D (Samaj lernantoj kiel C, 3 studhoroj semajne): 12 lecionoj

Sur la benko de akuzatoj

Jen ili estas: Ada, Alma, Blanche, Betsy. Camilla, Carla, Claude, Clara, Cleo, Donna, Dora, Ella, Emilia, Esther, Flora, Gladys, Helena, Hilda, Ida, Judit, Lujza, Pamela, Polly, Shirley, Thelma, Vera, Viola.

La du ĉefkulpuloj: Sangavida Mary kaj Murdema Inez.

La akuzo kontraŭ ili: kruela masakro, vandala detruado.

Jes, ĉi tiuj ĉarmaj nomoj maskas murdistinojn.

Kie ili aperas, la tero fariĝas dezerta. La sinjorinoj galopas kun stentorega hurlado kaj ĉion forbalaas kun demona forto, kio barus al ili la vojon. Ĉi tiuj diablinoj furioze elŝiras arbojn kunradike el la tero, ruinigas domojn ĝis la fundo de la fundamento. Sur la maro ili kirlas trombojn pereigajn.

La meteorologoj — Dio scias laŭ kia asocio de ideoj — donas virinajn nomojn al la detruaj-ekstermaj ciklonoj (tajfunoj, tifonoj, tornadoj).

La mondĵurnaloj antaŭ nelonge raportis pri tio, ke la nacia organizo de la Usonaj virinoj protestis ĉe la centra meteorologia instituto en Vaŝingtono kontraŭ la ofenda baptado kaj postulis la ŝanĝon de la nomoj. La respondo estis: NE!

Sed ŝajnas, ke la atenton de la grandfantaziuloj ĝis nun evitis tio, ke krom la ciklonoj ekzistas ankaŭ aliaj naturaj katastrofoj: sismoj (tertremoj), grandaj incendioj, vulkanerupcioj, invado de akridoj, inundoj, se ne paroli pri la epidemioj. Ĉu ne estus bonega ideo bapti sammaniere ankaŭ tiujn katastrofojn? Tertremo Inez, salta ondego Julieta, ĥolera epidemio Ella, H-bomb-atako Mimi, ĉu ne belaj?

Mi estas de alia opinio. Kaj ĉar, bedaŭrinde, en la supra nigra listo troviĝas jam ankaŭ mia nomo, kaj ĝi ankaŭ restos tie pro la obstineco de la „baptopatroj", mi sentas ĝin makulita, kaj kion alian mi faru ol ĝin forĵeti. Do solene mi deklaras ĉi-loke, ke de nun mi estas:

— **Eta** —

SPORTO

La kvanto de alproprigeblaj morfemoj dum la unua studjaro

Lernejtipo	Kvanto de morfemoj			
	leksemoj		gramemoj	Entute
	produktive	reproduktive		
A	211	23	87	321
B	369	64	128	561
C	369	64	128	561
D	481	81	154	716

Kontrolo

Estas demonstrenda:

1. Ke en lernejaj cirkonstancoj, ĉe instruado de Esperanto kaj de alia fremda lingvo laŭ la samaj kondiĉoj, Esperanto estas pli facile, pli efike kaj pli firme alproprigebla ol alia fremda lingvo:

2. Ke Esperanto, kiel baza fremda lingvo, pli efike helpas la lernadon de ĝin sekvanta dua fremda lingvo;

3. Ke dum la instruado kaj lernado de Esperanto kreiĝas pli bonaj cirkonstancoj por la praktika uzado de la lernata lingvo. Ĝi kreas:

intensivan kaj pedagogie kaj didaktive tre valorajn kontaktojn inter la lernantoj, inter la instruistoj kaj inter la lernejoj.

La rezultoj de la punkto 3 estas facile demonstreblaj per faktoj (korespondaĵo, renkontiĝoj, Internacia Lernejo, ekspozicioj ktp.).

La rezultojn de la punkto 1. ni demonstros per konkretaj mezuradoj, okazontaj ĉiujare post la unua duonjaro kaj je la jarfino. La mezurado okazos per testoj. Ĉiu instruisto analizos la rezulton en sia lernejo kaj sendos la analizon al la Landa Respondeculo, kiu resumos la landan rezulton kaj sendos al la Centro. En la centro aparta labor-grupo resumos la 5-landan rezulton.

La mezuradon de la punkto 2. oni devas fari post la 3-jara eksperimento. Ĝi bezonas pli longan tempon kaj ankaŭ specialajn cirkonstancojn. Ĝia metodiko estos nur poste ellaborebla.

S-ro Avery Brundage, la prezidanto de la Internacia Olimpika komitato venis al Hungarlando en septembro, por partopreni la 75-jaran jubileon de la hungara olimpika movado. Dum sia 6-taga restado en nia lando li faris multajn interparolojn kun la gvidantoj de niaj partio kaj ŝtato, kun la direktantoj de la hungara sporta vivo, kaj vizitis kelkajn sportajn unuiĝojn, establaĵojn kaj instituciojn.

*

AKVOPILKADO. — En septembro disvolviĝis en Barcelono la Eŭropo-ĉampionado de naĝo, plonĝo kaj akvopilkado. La hungara akvopilkoteamo gajnis la arĝentan medalon.

KAJAKADO-KANUADO. Komence de aŭgusto disvolviĝis en Kopenhago la mondĉampionado de kajakado-kanuado. Laŭ la neoficiala kalkulo Hungario finis en la dua loko, post Sovetunio. Al tiu sukceso kontribuis unuavice du unualokaj klasigoj, nome Tamás Wichmann en la disciplino 10 000-metra solopa kanuado (C—1 10 000 m) kaj Tibor Tatai en la 1000-metra solopa kanuado (C—1 1000 m).

MODERNA PENTATLONO. La 1-an de aŭgusto komenciĝis la mondĉampionado de moderna pentatlono en Warendorf (G. F. R.). La hungara nacia teamo plenumis la ĉampionadon kun brila sukceso. Krom gajni la oran medalon de la individua kunmetita konkurso — dank' al la juna nova mondĉampiono Péter Kelemen — kiel same la oran medalon de la teama kunmetita konkurso, la hungara teamo atingis unualokan klasigon ankaŭ en la subbranĉoj rajdo, skermo kaj naĝo, kaj akiris la duan lokon en pistolpafo kaj kuro. La arĝenta medalo de la individua dualoka klasito, András Balczó kaj pli da avanaj individuaj klasigoj en la konkursoj de la kvin subbranĉoj igis ankoraŭ pli elstara la venkon de la modernaj pentatlonistoj. — La oran medalon de la individua kunmetita konkurso de la junulara mondĉampionado de moderna pentatlono en Fontainebleu (Francio) gajnis Zsigmond Villányi kaj nia teamo finis en la dua loko.

NAĜO. La Barcelona Eŭropo-ĉampionado estis favora ankaŭ al niaj naĝistinoj, kiuj hejmenportis du orajn kaj du arĝentajn medalojn. Nia juna, esperplena naĝistino, Andrea Gyarmati gajnis oran medalon en du disciplinoj, nome en la 100-metra virina papilinaĝo kaj en la 200-metra virina dorsonaĝo, kaj havigis al si kiel trian, la arĝentan medalon de la konkurso de 100-metra virina dorsonaĝo. La virina teamo de la 4×100-metra liberstila stafetnaĝo atingis la valoran dualokan klasigon.

PAFO. En la dua duono de oktobro oni aranĝis la mondĉampionadon de pafo en la Usona Phoenix. La hungara pafista trupo prezentis sin per belaj rezultatoj en la renkontiĝo de la mondnivelaj pafistoj. En la disciplino pafo per aerpistolo la titolon de mondĉampiono akiris Kornél Marosvári per suma cirklovaloro 383. En la kuŝa pozicio de la disciplino 120-pafa kunmetita pafo per etkalibra sportfusilo venkis László Hammerl per suma cirklovaloro 399, rezulto unu poenton malpli ol la absoluta mondrekordo. Same unualokan klasigon atingis Lajos Papp en la surgenua pozicio de la disciplino 120-pafa kunmetita pafo per grandkalibra sportfusilo, per suma cirklovaloro 384, krome en la kunmetita taksado de la tri pozicioj li gajnis la bronzan medalon.

SKERMO. En la mondĉampionado de skermo, okazigita dum la dua duono de semptembro en Ankaro, post ok jaroj revenis en la posedon de hungara skermisto, nome en tiun de Tibor Pézsa, la ora medalo de la disciplino individua sabrado. Venkis en la ĉampionado ankaŭ la hungara spadoteamo. En la altnivela internacia ensemblo la hungara skermotrupo atingis dualokan klasigon.

TABLOTENISO. Komence de aŭgusto okazis la junulara Eŭropoĉampionado de tabloteniso en la Anglia Teeside. En la knabina parludo venkis la hungara duopo Juhos-Lottaler. En la knaba parludo venkis Tibor Klampar kun sia sveda parulo.

Tibor Újlaky-Nagy

Lajos Tárkony

REVUO DE REVUOJ

THE BRITISH ESPERANTIST publikigas multajn pli malpli interesajn notojn pri lingvo, organizo, propagando, (kompreneble ne povas manki problem-artikolo ankaŭ pri la decimala monsistemo, unu el la grandaj zorgoj de la Insulo). Plurnumere mi trovis po ses sonetojn de Shakespeare, tradukitajn de Simon Aarse: ŝajne li volas traduki la tutan sonetaron kaj atingis jam super la numero 80. Pri tiel granda entrepreno oni nepre devas fari mencion, eĉ se kun la aldono, ke ,,in magnis et voluisse sat est'', t. e. en grandaj aferoj sufiĉas jam ankaŭ la volo. Fakte, la sugestia forto de la originaloj iel perdiĝis dum la tradukaj klopodoj, bedaŭrindaj estas la ofta malsameco de la rimvort-finaĵoj; ekz-e: bari-faru, lasta-prokrasto, frue-unua. Kaj en la soneto No 75 la lastaj du versoj sonas: ,,jen mortsopira aŭ en voma stato luksmanĝas mi, aŭ sola kun malsato''. Ve! Tiu traduko de *surfeit* per ,,voma stato'' min vere ŝokis (kaj mi miras, ke ĝi ne ŝokis la redaktoron). Kalocsay tradukis: ,,jen en mizer', jen en festen-ebrio, ĉion manĝegas mi aŭ mankas ĉio''.

MEDICINA INTERNACIA REVUO ree donas interesan legaĵon: ekz-e la prezentadon de ,,Atombomba Malsano'' nove eldonita en Japanujo, kaj artikolon pri tio, ke dono de tro grandaj dozoj de B^1-vitamino ne estas superflua malŝparo, sed povas havi favoran efikon sur la organismon.

LA PRAKTIKO estas plena de simplaj kaj simplastilaj artikoletoj, ĝin nepre devus aboni ĉiu, kiu sur la ŝtuparo de facilaj legaĵoj volas sin prepari por literaturo malpli facile alproprigebla. Serĉante en ĝi objekton de diskuto, mi trovis nur la artikolon de R. P. Noguiera ,,Genro en Esperanto''. Li atakas en ĝi la tezon de Plena Gramatiko, laŭ kiu en E-o ne ekzistas gramatika genro; nome, laŭ lia interpreto tio povas signifi nur, ke en E-o genro kaj sekso koincidas, kaj tio ĉi estas tute falsa, ĉar nomoj de bestaj seksuloj kondutas kiel neŭtroj. — Sed ĉu tio estas ĝusta refuto? En la lingvoj, kie ekzistas genroj, tiu genro dependas de formo aŭ estas kapricnaskita, ofte sen konsidero pri la sekseco: en la germana: *Mädchen* (knabino) estas neŭtra, ĉar ĉiuj vortoj havantaj la etigan sufikson ,,chen'' (eto) estas neŭtraj; *tranĉilo* estas neŭtra, *kulero* estas vira, *forko* estas ina, el nura lingva kaprico. Nenio tia ekzistas en E-o. Estas vere, ke ĝenerale nur la personojn oni distingas laŭ sekseco, sed tio okazas el nura praktika motivo: ĉe la bestoj multfoje oni ne tro zorgas pri tio, kian sekson ili havas kaj ofte eĉ malfacile estus de fore konstati, ĉu temas ekzemple pri virkolombo aŭ kolombino, pri virtalpo aŭ talpino, pri virkato aŭ katino. Sed se la sekso estas konstatita kaj eĉ grava, oni faras distingon, vd. la zamenhofan: ,,melku virkapron, li lakton ne donos'', Anstataŭ do enporti la nocion *genro* en nian lingvon, pli simple estas diri, ke ĝi estas identa kun la sekso, tamen ĉe bestoj la seksa distingo estas neglektebla, precipe, se ĝi eĉ ne estus facila, sed ne nepre neglektenda. La samo rilatas ankaŭ pri ,,infano'' aŭ ,,persono''. La diferenco estas, ke ĉi tie oni uzas ,,li'' anstataŭ ,,ĝi'', se oni ne scias, ĉu temas pri vira aŭ ina estaĵo. Jen kion malfacile estus klarigi per ia ajn regulo de genro.

OOMOTO INTERNACIA estu ree menciita: sur sia titolpaĝo ĝi havas la *A-bomban Memordomon* starantan kiel granda averto en Hiroŝima. Tre interesa estas la artikolo de D-ro Sho-ichi Hori: ,,El la maoria historio''. Mi nur bedaŭris, ke mankas artikolo prilingva de Nakamura Tazao, konsolis min la ekscita artikoleto de Kalocsay pri la traduk-aventuroj de la ,,Vesperkanto de Migranto'' de Goethe.

En iu mia revuado mi nostalgiis pri la fabel-ampleksaj recenzoj de la iama ,,Lingvo Libro'', Nun konsolis min tri recenzoj de konsiderinda amplekso: en HEROLDO DE ESPERANTO tiu de R. Rossetti pri la grandioza *Plena Ilustrita Vortaro* redaktita de *Waringhien*, kaj en NORDA PRISMO tiu de Edwin de Kock pri la traduko de *Somermeznokta Sonĝo* de *Shakespeare* fare de *Kalocsay* kaj tiu de J. F. *Quirke* pri la dua eldono de ,,La Infana Raso'' de *William Auld*. Mi povas nur vivui kaj aplaŭdi, kaj en mia ĝojo plej volonte mi detenus min de ĉia diskuto. Jes ja, ĉar precipe la recenzo de E. de Kock estas plezura legaĵo (malgraŭ tio, ke ne en ĉio mi konsentas kun li, sed tiaj kontraŭaĵoj eĉ pliigas la plezuron, nutrante la diskutemon, kiun mi nun tamen subpremas). Jes, plezura, ĉar tiel libere kaj leĝere li babilas, kaj ĉar li povas veki la interesiĝon pri la libro — maloftaĵo ĉe E-aj recenzistoj. Se post tiu recenzo la libro ne disvendiĝos eksprese, tiam mi ne scias kion pensi pri nia ,,diligenta kolegaro''.

THE AUSTRALIAN ESPERANTIST estas modesta gazeto kun siaj ok paĝoj (pliigitaj tamen per la malgrandeco de la litertipoj), sed en ĉiu numero oni trovas ion interesan, certe dank' al la plumo de la redaktoro *F. R. Banham*. Nun inter ,,Recenzoj'' mi trovas kritikon pri ,,Norda Prismo'' (N-ro 3—4, 1969); ĝi estas riĉa de rimarkoj indaj je serioza konsidero, ĉu pozitive, ĉu negative. Laŭ la recenzanto la revuo meritas pli vastan subtenon ol ĝis nun ĝi akiris, tamen li trovas ĝin kelkfoje jen trointelekteca, jen troekzalta. Li citas *Manders*, plendantan pri la ,,profesiaj esperantistoj'', kiuj forgesis, kiom da jaroj ili bezonis por atingi sian lingvan perfektecon, kiun ili postulas de la aliaj. La recenzanto diras, ke ĉi tiu opinio estas diskutinda. Nu, mi opinias, ke tiuj ,,perfektuloj'' postulas ne tion saman, kion ili atingis, nome la aktivan majstradon de la lingvo, sed ion multe pli facilan: ĝian pasivan komprenon. Sed oni devas vere aplaŭdi pri la lasta frazo de la recenzo: ,,eldonistoj donu baladojn, kiuj saltigas la sangon, novelojn, kiuj nin surprizas per finfrapa frazo, poemetojn, kiuj per rekta lumfluo en la animon, esperigas pri la homo, pri la mondo, pri la destino''. Tamen oni devas konsideri, ke la nuntempa poezio en la naciaj lingvoj fariĝis pli-malpli ,,hermeta'', implikita k. t. p. (Nogueira povus plimulte pri tio skribi), kaj oni eble povus pensi, ke ties influo sur la Esperantan poezion apenaŭ estas malhelpebla. Oni devus do havi pli grandan paciencon por la dečifro de tiuj novspecaĵoj, aŭ almenaŭ sufiĉe da sento da humuro, por rideti pri ili.

AKVO-ESPLORO
AKVO-ELTERIGO
AKVO-REZERVADO
AKVO-PURIGADO

PRI AKVO-PROBLEMOJ STARAS JE VIA DISPONO

NIKEX, HUNGARA EKSTERLANDKOMERCA ENTREPRENO POR PRODUKTAĴOJ DE PEZA INDUSTRIO

BUDAPEST, V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6., BUDAPEST 5. PF. 128. TELEGRAMOJ: NIKEXPORT BUDAPEST.

NIKEX, HUNGARIAN TRADING COMPANY FOR PRODUCTS OF HEAVY INDUSTRY

BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. P.O.B. 128. BUDAPEST 5. CABLES: NIKEXPORT

NIKEX UNGARISCHES AUSSENHANDELSUNTERNEHMEN FÜR DIE ERZEUGNISSE DER SCHWERINDUSTRIE

BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. BUDAPEST 5. POSTFACH 128. TELEGRAMME: NIKEXPORT

NIKEX SOCIÉTÉ HONGROISE POUR LE COMMERCE DES PRODUITS DE L'INDUSTRIE LOURDE

BUDAPEST V., JÓZSEF NÁDOR TÉR 5—6. BUDAPEST 5. B. P. 128. TÉLÉGRAMMES: NIKEXPORT BUDAPEST

Publika letero al Usona profesoro

Kara Profesoro Ringer!

Pasis jam kelkaj monatoj de post nia lasta renkontiĝo en la usona urbo: U r b a n a (Ŝtato Illinois*). Tio estis mia dua vizito en la U n u i ĝ i n t a j Ŝ t a t o j kaj ankaŭ en la plej granda universitato de Ŝtato Illinois: U n i v e r s i t a t o d e I l l i n o i s. Ĝi estas ne nur unu el la plej grandaj en Usono, sed ankaŭ unu el la plej elstaraj. Ne nur la granda nombro de la studentoj (42 000 !), sed ankaŭ la altnivela scienca esplorado kaj instruado impresas la vizitantojn.

Mi bone scias, ke Vi, dr-o Ringer, profesoro de muzikologio, grandege kontribuis al la internacia famo de U n i v e r s i t a t o d e I l l i n o i s. Vi sukcese agadas en la plivastigo de rilatoj inter via universitato kaj universitatoj transmare. Antaŭ du jaroj Vi portis dek usonajn muzikinstruistojn al Hungario por dek-monata studvojaĝo, ĉar Vi estis konvinkita pri la eminenteco de la hungara sistemo de muzika edukado establita de Z o l t á n K o d á l y. Ĉu vi memoras, kara sinjoro Profesoro, la tagon, kiam, antaŭ kvin jaroj, Vi la unuan fojon vizitis kune kun Zoltán Kodály la Hungaran Instituton Por Kulturaj Interrilatoj en Budapeŝt? De tiu tempo ni ofte renkontiĝis kaj paroladis pri multaj aferoj, inter aliaj ankaŭ pri Esperanto. Mi montris al Vi mian artikolon aperintan en H u n g a r a V i v o pri la hungara muzika edukado. Vi legis la artikolon en la originalo kaj preskaŭ tute Vi komprenis ĝin.

Pasintjare mi akompanis hungaran agrokulturan delegacion al Usono por viziti usonajn universitatojn kaj agrokulturajn esplor-instituciojn. (La scienca kunlaboro inter usonaj universitatoj kaj hungaraj esplor-institutoj havas jam multjaran tradicion.) Nu, ni trovis okazon daŭrigi nian konversacion komencitan pli frue pri diversaj aferoj. Ni parolis denove ankaŭ pri Esperanto. Vi montriĝis (kiel ankaŭ alitempe) tre komprenema, sed Vi esprimis ankaŭ kelkajn skrupulojn. Mi bone memoras, ke Vi argumentis kontraŭ Esperanto emfazante la signifon de idiotismoj en la naturaj lingvoj. Vi diris, ke sen ili oni ne povas esprimi nuancojn kaj la lingvo perdas sian intimecon. Tiam mi ne havis sufiĉe da tempo pridiskuti tion kun Vi.

Nu, mi parolas vian lingvon (la anglan) de pli ol dekkvin jaroj, mi lernis centojn da anglaj idiotismoj, tamen mi povas bele esprimi nuancojn nur en mia gepatra lingvo, la hungara. La homaro ne zorgu pri nuancoj, sed ni solvu la gravajn problemojn de nia epoko, tiujn de malsato kaj milito. Kial penadi kun nelerneblaj gramatikaĵoj, idiotismoj kompreneblaj ofte nur por indiĝenoj kaj lingvotalentuloj?

Aliflanke ne pravas tiuj, kiuj opinias, ke Esperanto ne povas esprimi nuancojn. Estu permesate rakonti al Vi la historion de eksperimento farita en Parizo antaŭ kelkaj jaroj. Oni tradukigis franclingvan tekston en diversajn lingvojn. Poste la tradukitaj tekstoj estis retradukitaj francen fare de aliaj tradukistoj. La rezulto estis surpriza: la plej akurata traduko, t. e. la plej simila al la originala franca teksto estis tiu, kiun oni tradukis tien kaj reen per Esperanto.

Sinjoro Profesoro, Vi rimarkis dum nia konversacio ke Esperanto disvastiĝas tre malrapide. Sed estas ja miraklo, ke ĉi tiu 80-jara artefarita lingvo estas jam parolata sur kvin kontinentoj, preskaŭ en ĉiu lando de la mondo. Estas miraklo, ke Esperanto transvivis du mondmilitojn, persekutadon de potenculoj kaj indiferentecon de grandaj nacioj.

Miaj plej kuraĝigaj observoj en Usono pri Esperanto estis miaj konversacioj kun ne-esperantistoj pri Esperanto. La plimulto de homoj (ĉefe intelektuloj) volonte akceptus Esperanton, kiel internacian lingvon, „se ankaŭ aliaj akceptus ĝin". La hezitado estas komprenebla. Ĉiu scias, ekzemple, ke paco estas bona. Tamen oni toleras, eĉ faras militon. Riĉuloj scias, ke milionoj da homoj suferas je malsato, tamen ili ne helpas.

En I o w a C i t y** la tiea universitato havas interesan internacian programon por eksterlandaj poetoj, verkistoj. Kun la estro de tiu programo, sinjoro profesoro Paul Engel, mi pritraktis partoprenon de hungara verkisto. Post la oficila programo mi vizitis gastejon, kie la eksterlandaj gastoj ofte renkontiĝas kaj dum trinkado ili pridiskutas literaturon, arton, politikon k.t.p. Tie mi renkontiĝis kaj longe paroladis kun junaj verkistoj, poetoj el Finnlando, Britujo, Germana Federacia Respubliko k.t.p. Kiam mi menciis, ke mi estas esperantisto, ili superŝutis min per demandoj pri Esperanto en Eŭropo, esperantlingva literaturo (originala kaj tradukita). Por ilustri la taŭgecon de Esperanto por poezio, mi recitis parton de poemo „Fine de Septembro" (Ŝandor Petőfi***):

Jen floras ankoraŭ la kampo de valo
kaj verdas ankoraŭ la poplo ĉe font,
sed jam tie, vidu, sub vintra vualo
sub neĝo kaŝiĝas la supro de mont.
Jen en mia koro sub flama radio
de l'suno paradas printempo de jun,
sed griza jam iĝis ĉe mia tempio
la nigra hararo — ĝin prujnis aŭtun . . .

Rekone ili kapbalancis kaj laŭdis la belan ritmon de la poemo kaj la lingvo.

Nu, helpe de Esperanto malgrandaj nacioj povas konigi sian literaturon al la mondo. Kiam Vi legos mian leteron, „Elektitaj Poemoj" de Petőfi estos jam aperintaj en la traduko de eminenta Esperanto poeto kaj tradukisto, Kálmán Kalocsay. Kio ne okazis ankoraŭ en la angla, okazos nun en Esperanto.

Mi povus argumenti plu por Esperanto, sed nun sufiĉas. Niaj legantoj kaj mi tre aprecus, kara Profesoro Ringer, se Vi bonvolus respondi al mia publika letero, eĉ se via opinio entute diferencas de la mia.

Sincere, via **Gábor Vigh**

* (pron.: ilinoj)
** (pron.: ajova siti)
*** La plej granda hungara poeto (19-a jarcento)

MEDICOR

produktas kaj eksportas:

instalaĵojn por rentgeno-diagnozo kaj radio-terapio, medicinajn elektrajn kaj elektronajn aparatojn por diagnozado kaj por kuracado, dormigajn aparatojn, instalaĵojn por operaciejoj kaj por malsanul-ĉambroj, sanitarajn veturilojn, medicinajn kaj veterinarajn instrumentojn, sanitarajn amasartiklojn, unufoje uzeblajn sterilajn ilojn. Kompletaj sanitaraj unuoj estas projektataj kaj liverataj. Informado kaj konsilado en hospital-projektaj-organizaj aferoj.

Medicor Uzinoj Budapeŝt

MEDICOR

MEDICOR BUDAPEST

TEATRA KRONIKO

Mia amo, Elektra. Post la belsukcesa prezentad-serio en la Nacia Teatro, ĉi tiu dramo de *László Gyurkó* estis spektebla ankaŭ per televido. Ĝi estas versio de la mita temo, kiun krom la tri grandaj helenoj, Eskilo, Sofoklo, Eŭripido, multfoje prilaboris ankaŭ aŭtoroj nia-epokaj, R. Strauss ankaŭ komponis pri ĝi operon. La hungara aŭtoro transprenas la bazon de la klasika temo: La reĝon Agamemnono, post lia reveno en la Troja milito, mortigis lia edzino Klitemnestra komplice kun sia adulta amato Egisto. Elektra, la filino de Agamemnono, vivas nur por la venĝo, reatendante sian fraton, Oreston, la venĝplenumonton. Oresto fakte revenas kaj mortigas Egiston, la uzurpulon kaj sangmanan despoton. De nun, la dramo ne sekvas la originan historion: Oresto rifuzas mortigi sian patrinon, Klitemnestran. Elektra postulas la patrinmortigon, eĉ pli, postulas venĝon kontraŭ ĉiuj, kiuj subtenis la abomenan uzurpulon. Disvolviĝas ekscita diskuto inter la gefratoj: Oresto deklaras, ke li venis liberigi, ne masakri, nek estigi denunculojn. Kaj nun metiĝas la demandoj, ĉu justa estas la „venĝo por la venĝo"; kiamezure licas lasi sin kuntreni de la morala indigno; ĉe kiu punkto la rajta kolero fariĝas proprajuĝe ekscesanta arbitro: certe demandoj aktualaj ĝis nun, precipe en postrevoluciaj tempoj. Elektra, laŭ la versio, en sia sangsoifa senindulgeco, fine turnas sin kontraŭ sia frato, volas ribeligi ĉiujn kontraŭ li, kaj tiam Oresto, necesbezone, mortpikas kaj amare priploras sian amatan fratinon Elektra. La nigravestan sombran Elektra-figuron ludis *Katalin Berek:* eksterordinara, rara travivaĵo estis ŝia grandpotenca, sugestia rolo-kreo.

La puruloj. La dramo de *Gyula Illyés*, post sia prezentado en la provinca urbo Pécs, nun estis ludata ankaŭ en ĉefurba teatro. La temon la aŭtoro kunportis el sia vojaĝo en suda Francio. En la unua duono de la 13-a jarcento, al la morna dogmiĝo de la religio kontraŭstaras ankoraŭ la loĝantoj de Provenco kaj Langvedoko, gardante la latinan serenecon, malamante la arbitron kaj kruelon, kaj donante liberecon al la albigensoj, kiujn la religia potenco deklaras herezuloj. Kaj komenciĝas la „sankta milito", ŝajnas plenumiĝi la vortoj de la papa legato: „Ĉu vi scias, kiu memoros post cent jaroj tiujn famajn foirajn kant-konkursojn, lampionajn ŝipojn, urbodomajn buŝadojn pri la justo kaj libero? Eĉ ne la korvo. Ĉion ni forbruligos, kiujn vi konglomeradis pri rajto, pri la rajto de koroj kaj popoloj". — La dramo prezentas la fin-tagojn de la batalo: en Montségur, fortikigita burgeto en Pireneoj, troviĝas la lasta loko de la rezisto. La fortikaĵestro Perella, enkorpiĝo de kavaliraj virtoj, estas saĝa kaj grandanima, sed, por eviti la sensencan masakradon, inklinas je honesta interkonsento. Lia bofilo, fortikaĵa kapitano, estas senindulga, grandvoĉa, preta apliki ĉiujn rimedojn; Marty, la episkopo de la „puruloj"-herezuloj estas la enkorpiĝinta asketismo; la papa legato, reprezentanto de la potenco, estas perfortema, nekonanta inhibon. Inter ĉi tiuj roluloj de la dramo viktimiĝas tragike la edzino kaj filino de la fortikaĵestro Perella. — La fino estas divenebla: Perella fariĝas viktimo de sia honesto, lia grandbuŝa bofilo transpartianiĝas al la malamiko. Ĉion ĉi Illyés prezentas en perfekte konstruita dramo, laŭ siaj vortoj: „tra la pasio de vivantaj homoj". Du grandiozaj rol-kreoj troviĝas en la prezentado: *Lajos Básti* kiel Perella, kaj *Éva Ruttkai* kiel la edzino.

El la Libro de Juĝistoj. Roma rabado. Taŭro-priploro. Ĉi tiujn tri poeziajn verkojn prezentis la *Literatura Teatro.* Ĉiu el ili estas de alia aŭtoro, sed kvazaŭ el komuna zorgo: ili estas triptika protesto kontraŭ la renaskiĝanta barbareco.

La plej morn-etosa estas la unua, verkita de *György Somlyó.* Li prezentas la teruraĵojn legeblajn en „Juĝistoj" (19—20) kaj komenciĝantajn per „En tiu tempo, kiam ne ekzistis reĝo ĉe Izrael, loĝis iu Levido . . ." Kaj oni dorsofrostas: kiomfoje oni serĉis kaj trovis pretekston por agi simile!

En *Roma Rabado* la poeto *István Vas* estas pli mildvoĉa. En lia poezia taglibro nur lia memoro citas la historiajn teruraĵojn kaj iliajn spurojn, nun jam estetikajn distilaĵojn. La historiaj tragedioj, la civilizoj parazite devorintaj unu la alian kaj postlasintaj nedissolveble kunfandiĝintajn restaĵojn, miksiĝas kun infanaĝaj rememoroj, „sudvoĉe kaj sonĝe" sonantaj sirenoj kaj kun la kirliĝo de modernaj aŭto-gregoj. La moralaĵo estas iom acida, tamen trankvilige sobra: la antaŭuloj detruis kaj rabis; ni daŭrigu ilian agadon sen detruo: ni rabu por ni tion, ni riĉiĝu per tio, kion ili kreis.

La *Taŭro-priploron* la aŭtoro, *Gábor Devecseri*, komencas jene: „Koncerne la taŭr-batalojn, mi estas taŭr-partiano". Tamen, la poemo nek kontraŭparolas al Garcia Lorca, nek polemikas kontraŭ Hemingway: ĝi ne ignoras, kun ia molaĉa humanismo, la homan kuraĝon kaj eltenon, sed mokas la sangsoifan indiferenton, kiu la murdadon rigardas el loĝio. La poeto, en la nomo de la vivo, ribelas kontraŭ la „beleco" de la morto. En lia verko bravure miksiĝas la lingvaĵo de ĉiutaga konversado kun la klasike alta tono de mitoj kaj fine ĝi solviĝas en la ĉarman simplecon de infankantoj, en la mildan deziron je la „kurtaj momentoj" de la paca vivo. Ni faru fine provon por la kreo de senperforta mondo — jen kion sufloras la verko, kiel ankaŭ la du antaŭaj. La kritikoj plej aprecas la rolludon de *József Madaras:* la radiantan simplecon, sensuspektan purecon de la Levido kaj la grandiozan prezenton de la Taŭro kun la lumo de la mistraktata senkulpeco en la okuloj.

KVK.

JUNECO, JUNECO

Forumoj por la junularo

Ĉu la junularo havas en nia societo eblaĵon publike priparoli siajn problemojn, publikigi siajn opiniojn kaj siajn verkojn pri tiuj? Kiel ili povas ricevi respondojn, klarigojn al siaj demandoj? — Tiel sonas la demandoj, kiujn ni volus ĉi-loke — almenaŭ skize — respondi.

Pluraj gazetoj parolas eksplicite al kaj pri la junularo kaj atendas, ke la junuloj plenkonfide serĉu ilin, ĉu persone, ĉu perletere.

Gravegan rolon ludas la gazetoj de la universitatoj, kiuj estas redaktataj de la studentaro kaj la profesoraro. Ĉiu havas specialan karakteron, sed iliaj komunaj trajtoj estas, ke ili publikigas literaturajn verkojn, skribas pri la kultura vivo, pri sporto. Ili informas pri la gravaj eventoj de la universitatoj, pri la vizitoj de eksterlandaj profesoroj aŭ studentaj delegacioj, pri la rezultoj de la ekzamenperiodoj, sed oni povas tie legi ankaŭ pri leĝeraj aferoj: ili enhavas ankaŭ humuraĵojn. Se paroli sincere, unu el la problemoj de tiuj gazetoj estas, ke la studentoj ne fruktuzas la ricevatajn eblaĵojn.

Similaj estas la gazetoj de la mezlernejoj, escepte, ke ili havas pli multe da legantoj, kaj ne estas tiom „adolteskaj".

Al la dekkelkjaruloj turnas sin la monata gazeto de la KJA, la *Junulara Magazeno*. Ĉiu ĝia numero enhavas — apud la seriozaj rubrikoj (ekzemple la letera rubriko: Honesteco, Amikeco, Konfido) — liston de la furorkantoj, bildojn pri la plej popularaj kantistoj, gitaristoj kaj ensembloj. Kiuj ŝatas korespondi, povas elekti el la adresoj publikataj por trovi junan korespondanton, kiu havas interesojn similajn al la liaj.

La ĵurnalo de la HSLP, la *Népszabadság* (Popollibero), ĉiudimanĉe donas kulturan suplementon, kies lasta paĝo parolas pri la internpolitikaj zorgoj de la junuloj, skribas pri la unuaj en- kaj eksterlandaj sukcesoj de junaj artistoj, scienculoj aŭ sportistoj.

Unu el niaj plej altnivelaj literaturaj gazetoj estas la „*Új Írás*" (Nova Skribo). Jam ankaŭ per siaj moderna aspekto, tipografio kaj grafikaĵoj ĝi kaptas la atenton de multaj junuloj, sed estas pli grave, ke la revuo surprenas la taskon prezenti novajn talentojn per la publikigo de iliaj verkoj, per riportoj faritaj pri ili kaj per la recenzado de iliaj „unuaj libroj".

Rilate la literaturon, ni turnu nin ree al la universitatoj. Ili regule aperigas kelkajn periodaĵojn, kiel la *Universitas*, kaj la *Tiszta Szívvel* (Purkore; la titolo aludas poemon de Attila József) kun enhavo literatura, kaj la *Acta Juvenum* kun filozofiaj, filologiaj kaj historiografiaj verkoj sciencaj; la *Matematikista Kuriero* kiu — malantaŭ la gaja alloga musofiguro de la kovrilo — enhavas taskojn el la klasikaj kaj modernaj ĉapitroj de la matematiko, kaj ni ne parolis ankoraŭ pri la gazeto de la Demokrata Mondfederacio de la Junularo, kiu aperas en kvar lingvoj, pri la semajna, tre multekzemplere eldonata gazeto de la KJA, pri la Hungara Junularo kaj . . . Kaj oni ne povas fini la vicon de la nekalkuleble multaj organoj metataj je la dispono de la junularo, sed ĝuste pro la nefinebleco prefere ni finu resumante, ke la junuloj vere havas ĉe ni eblaĵon por voĉdonado.

Kiel lerni lingvojn?

Atentinda kaj interesa libreto aperis antaŭ kelkaj monatoj en Budapeŝto: *Jen kiel mi lernas lingvojn*. Kial ĝi interesas nin, esperantistojn — konstantajn lingvolernantojn? Ĉar la aŭtorino, Kató Lomb, estas interpretisto 16-lingva. La libreto donas — eksterordinare amuze — uzeblajn sciindaĵojn.

La verkistino neas la ekziston de la tiel nomata lingvistika sento. Laŭ ŝia — riĉa-sperte apogita — opinio, kiu estas diligenta, kiu havas iom profundan intereson pri iu fremda lingvo, tiu povas ĝin pli facile kaj pli rapide alproprigi. Ŝia teorio estas iom trankviliga kaj samtempe instiga, ĉar neniu devas — kaj povas — senespere ĝemeti: Superflua, vana estas por mi eklerni, ĉar mi ne havas lingvistikan senton!

Sed ni transdonu la vortojn al la libro, citante kelkajn detalojn el la travivaĵoj tie kolektitaj.

Oni devas legi — diras la verkistino — sed unue ne klasikaĵojn. Unu el ŝiaj konatinoj, kiu hungare lernis, karakterizis iun jene: Li estas kavalirstatura, sed orgojla. (Ŝi lernis el la romanoj de Jókai.)

Do, ni legu ekzemple kriminalajn romanojn, kaj dume ni ne serĉu ĉiujn vortojn en la vortaro. Multe pli da danĝeroj devenas el tio, se la libro ekenuigos nin pro la multaj interrompoj, ol se ni ne scias, ĉu la inspektoro gvatas la murdiston el trans prunel-aŭ kratag-arbusto.

(Intermetita rimarko: Ĉu sufiĉe multe da legantoj kaj lernantoj konas la didaktik-cele verkitan libron de Julio Baghy: „La verda koro"?)

„Mono kalkulite, lernolibro verkaĉite estas bonaj" — Ŝi asertas tion. Tial oni ne uzu pruntepetitajn librojn, prefere legu proprajn, malkare aĉetitajn.

Gravega estas la korekta prononco. — Jen kio okazis al hinda studento en la flughaveno Londona. „Celo de via vojaĝo?" — demandis la oficisto. „Studvojaĝo". „Kaj kio estos la objekto de la studo?" „Lav" — respondis la studento, kiu ĝis tiam verŝajne vidis nur skribita la vorton *law* (juro), kaj tial li prononcis ĝin kiel la vorton *love* (amo).

Ni menciu fine laŭvortan citaĵon, kiu ne rilatas la lingvolernadon; ĝin diris la mondfama itala poligloto, Mezzofanti, kiu ellernis ĉirkaŭ 80 lingvojn sen tio, ke li vojaĝus eĉ unufoje eksterlanden: „Ĉu vi scias, kiu estas la lingvo, kiun pro ĝia konstrukapablo kaj pro la harmonio de ĝia ritmo mi metas antaŭ la aliajn, en unu vicon kun la greka kaj la latina? La hungara" . . . Ŝajnas, ke eĉ la hungaroj mem ne scias, kian trezoron ilia lingvo en si kaŝas.

János Tóth

NAJBARECO, AMIKECO

Litova SSR

Litova respublika klerigministerio ekde pasinta jaro permesis praktikadon de internacilingva instruo por gelernantoj super kvarklasuloj. Instruadon oni praktikas kiel fakultativan lernobjekton.

Inter esperantistoj de Baltlandaj respublikoj ekde pli ol dekdu jaroj regule estiĝas najbara amikkunlaborado sub la flago „BET", modeste nomata „Tendaro". Tendaranoj tradicie ĉiam renkontiĝas en la alia respubliko laŭvice. En la pasinta jaro oni aranĝis la XII BET tendaron en la urbo Kretinga, situanta apud la Baltmara sukcena kuracloko Palanga. Inter tendaranoj, krom ĉebaltlandanoj, partoprenis ankaŭ agemaj esperantistoj el diversaj Sovetaj respublikoj kaj urboj, nome: Moldavio, Kazahstano, Ukraino, Gruzio, kaj Moskvo, Kievo, Leningrado, Minsko. Tutsume ĉeestis 319 partoprenantoj, inter ili pli ol 50 procentoj da junularo. En la nuna jaro oni aranĝos la sekvontan Tendaron en la Latva SSR.

Vl. Kazlauskas, Kaŭnas, Varpo 21—I.

Rumanio

En aŭgusto de 1970 okazis en la banloko Covasna tutlanda esperantista renkontiĝo. La 144 partoprenantoj el 26 urboj decidis starigon de „Rumana Kunordiga Esperanto Komitato", kies celoj estas kunordigi la agadon de Esperanto-rondoj funkciantaj ĉe Kulturdomoj, ebligi ilian spertoŝanĝon kaj apogi la estigon de novaj kulturdomaj Esperanto-rondoj. La Komitato elektis plenuman buroon. Prezidanto: Jozefo Petrin (Bukareŝto, Câsuta postaĵâ 205) kaj ĝenerala sekretariino: Maria Vitályos (Tîrgu-Secuiesc C. P. 14, jud. Covasna, telefon: 137).

Maria Vitályos

DDR

Geesperantistoj atentu! 10 gekursanoj de div. aĝo, fariĝu entuziasmaj esperantistoj helpe de viaj bildkartoj el ĉiuj landoj. Ĉiu sendinto ricevos dankrespondon. Skribu al: Deutscher Kulturbund, Sekcio Esperanto, DDR — 27 Schwerin, Wilhelm Pieck Str. 8. — Kun samideana saluto *Stechert.*

Pollando

Kun granda ĝojo mi informas, ke Pola Radio Gdansk rekomencis disaŭdigi en Esperanto. Disaŭdigoj okazadas ĉiun duan vendredon, je la horo 23.40, kaj la ripetoj ĉiun duan sabaton je la horo 12.30, sur la kurtondoj: 19.8, 30.8, 31.1, 31.4, 41, 48, 49 m, kaj sur la ultrakurtondo de 66.29 MHz. Ni petas esperantistojn, ili bonvolu sendi plej multnombre leterojn kun programproponoj kaj salutoj. De tio dependas sorto de nia disaŭdigo. La leterojn bonvolu adresi: POLA Radio, Esperanto-Fako, GDANSK-WRZESZCZ, str. Uphagena 1. Pollando

Wl. Palaszewski, prez. de la FILIO de PEA en Gdansk.

Ferio en Pollando

En pitoreska, romantika valo, ĉirkaŭta de altaj montoj de la Silezia montaro, en 600-metra alto super la marnivelo kuŝas la pola ripozloko *Miedzygórze* (pron. mjendziguje), jam de ses jaroj unu el la plej ŝatataj kaj frekventataj internaciaj esperentistaj renkontejoj. La aranĝo, nomata *Internacia Esperantista Ferio*, okazigata ĝenerale en la dua duono de septembro, disponigas agrablan restadon kaj kompletan provizadon je modera prezo por en- kaj eksterlandaj esp-istoj, kiuj deziras pasigi du senzorgajn semajnojn en vere internacia medio, en saniga montara regiono, en la plej granda kaj plenkomforta sindikata ripozdomo de la vilaĝo.

Kune kun preskaŭ 30 hungaraj s-anoj ankaŭ mi havis la bonŝancon esti partoprenanto de tiu ferio la lastan aŭtunon, kaj mi sentas mia devo mallonge sciigi Vin, Karaj Legantoj, kiel disvolviĝis tiu bonsukcesa aranĝo. Bonvolu konsideri mian ĉisuban raporton mia modesta sed dankema rekompenco por la materiala subteno de *la Polaj Sindikatoj kaj por la lertaj iniciato kaj organizado flanke de la estraro de la Vroclava regiono de la Pola Esperanto-Asocio*, sen kiuj IEF. ne estus realigebla.

La antaŭtagmezojn utiligis du lingvokursoj; fundamenta, gvidata de s-ano *Marian Tyszkiewicz* kaj konversacia, gvidata de s-ano *Stanislaw Swistak*. Pli da kolektivaj ekskursoj piedaj kaj busaj ebligis al la volontulaj partoprenantoj ekkoni la proksiman ĉirkaŭaĵon de la ripozloko, surgrimpi altajn montosuprojn, respektive fari pli grandan vojaĝon kaj konatiĝi kun pli da urbetoj kaj vilaĝoj de tiu regiono tiom abunda je historiaj kaj artaj memoraĵoj.

Lerte organizis f-ino *Maria Proch* la vesperajn prezentadojn, el kiuj mankis nek instruaj nek amuzaj programoj. Mi mencias kelkajn pli elstarajn. Dum la Internacia Estrada Vespero oni povis ĝui ĉeĥoslovakajn, germanajn, polajn kaj hungarajn popolkantojn kaj tradukitajn poemojn. La senaplomba, gaja parolado de s-ano *Andrzej Pettyn*, akompanata de esperantlingvaj kanzonoj, vekis grandan plaĉon. La kostuma popoldanco de polaj geknabetoj estis ĉarma spektaklo. La lingve kaj enhave altvalora prelego de mag. *Tyburcyusz Tyblewski* pri la Polaj Okcidentaj Teritorioj katenis la aŭskultantojn. La pianokoncerto. Ŝopena recitalo, ludata de la pianartistino f-ino *Grazyna Zajac*, donis noblan spiritan ĝuon, dum la balo de la ĉifonuloj proponis neĉiutagan travivaĵon kaj amuzon.

Dum la tuta ferio tenis konstantan kontakton inter la gvidantaro kaj feriantoj, sprite ludis la rolon de programanoncisto ĉe la diversaj prezentadoj kaj bonege plenumis la oficon de lerta, bonhumora ĉiĉerono, en perfekta Esperanto, s-ano *Stanislaw Swistak*.

Kiam la suprajn detalojn mi kompletigas per tio, ke la gastoĉambroj, provizitaj per varma-malvarma akvo kaj centra hejtado, estis puraj kaj komfortaj, ke la gastojn servis nombro da banĉambroj, ke la manĝoj estis bongustaj kaj kontentigaj, tiam mi devas ne forgesi, ke pri ĉio ĉi zorgis tre fakscie kaj konscience s-ino *Lucyna Klepacka*, la estrino de la ripozdomo.

Ĉe la ferma solenaĵo la estraro invitis nin, kaj pere de ni ĉiujn espistojn dise en la mondo, viziti IEF-on ankaŭ ĉi-jare, dum la belaj tagoj de la „pola ora aŭtuno". Detalajn informojn ricevos ĉiu, kiu skribos al: *Pola Esperanto-Asocio, regiono Vroclavo, Wroclaw, ul. Dubois 3.*

Tibor Újlaky-Nagy

El la leteroj

Mi ne parolu pri mia estimego koncerne vian revuon, mi estas certa, ke vi ĉiutage ricevadas multajn leterojn, kun dankoj pro tio, ke HV ekzistas. Vere via „Hungara Vivo" meritas ajnan laŭdon, admiron kaj se vi deziras, flaton . . . — *Eŭgeno S. Perevertajlo*, Taskento, Junulara Esp. Klubo.

*

. . . Mi ne kritikas, eĉ nun ne faras tion, sed nur la veron diras-esprimas, mian alparolon. La enhavo de HV estas kiel en pasinteco nun ankaŭ kontentiga-bonega, speciale la diversaj artikoloj. Mi volonte kaj fiere povas diri, ke ne ekzistas simila Esperanto-revuo en la mondo. Ĉiu esperantisto, kiu havas feliĉon legi vian revuon, povas ege ĝoji. Tiel multvaloran Esperanto revuon, nur vi hungaroj scias krei-eldoni ! . . . Mi povus daŭrigi la laŭdon, sed kial mi daŭrigu, kion mi skribis, jam estas sufiĉa. Koncerne eksterajon, estas denove bonega, frapa, altnivela, bonkvalita la presado en koloroj, kaj tute plaĉa. Ne estas lastloke ankaŭ la paperkvalito. Fine, estus pli bone, se via revuo anstataŭ 4 foje aperu 6 foje, ĉar tri monaton atendi, tamen estas longa tempo, kredu al mi . . . — *Ferenc Lehotkay K.* Jugoslavio-Zrenjanin, ulica Dj. Stratimirovica 5.

*

. . . Nun ni uzis vian belegan revuon kaj kun vera ĝojo mi konstatis grandan intereson, kiun vekis la enhavo de prezentitaj ekzempleroj. Estas malnova vero, ke la pola kaj hungara nacioj estas proksimaj, sed la reciproka kono ĉiam ankoraŭ estas malvasta. Ni mendis la revuon Hungara Vivo, kaj nun ni senpacience atendas proksiman ekzempleron, kiel bonan amikon. Plej korajn salutojn al ĉiuj anoj de ŝatata Redakcio sendas *Esperanta Rondo „Verda Vento"* ĉe konsuma kooperativo. W. S. S. „Spolem" en Zgorzelec, Pollando.

*

. . . Valoro de iu revuo plej bone videbliĝas, kiam ĝi estas bindita en libron. Kaj mi estas feliĉa, posedante du dikajn volumegojn de via revuo. Mi abonas la Hungaran Vivon ekde jaro 1963 kaj mi bindigis la jarkolektojn de 1963 ĝis 1967. Kaj mi jam antaŭĝojas, ke baldaŭ mi povos bindigi la 1968-an, 1969-an kaj ĉi-jaran kolektojn en pluan libron. La du libregoj estas por mi vera enciklopedio pri Hungario . . . La nova aspekto de Hungara Vivo estas pli moderna kaj malpli serioza, ol la aranĝo de la antaŭaj jarkolektoj. Dum la malnovaj kolektoj estis vere seriozaj kaj grandparte literaturecaj, la nova aranĝo ŝajnas al mi pli viva kaj pli belaspekta, sed tamen iel ĝi ne ŝajnas al mi taŭga por kvaronjara revuo. La viva kaj moderneca aspekto de la revuo nepre postulas pli oftan aperadon, ĉar la nuna aspekto vere taŭgas por ĉiumonata revuo . . . — *Jiri Patera*, Průběžná 1439/1, Most, Ĉeĥoslovakio.

*

S-ro Adrian Oates, Chester, Anglujo. Koncerne la artikoleton en n-ro 1/1970, ni volonte donas lokon al via pliĝustigo. Jen: La unua kolegio en Cambridge estis fondita en la jaro 1257, kaj la unua kolegio en Oxford en la jaro 1249. Ni dankas vian aprecon pri nia gazeto.

ABONO DE HUNGARA VIVO EN EKSTERLANDO

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62, P. O. Box 149. — Abonprezo por unu jaro en Usonaj dolaroj = 2,—

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

AŬSTRIO: Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A—1200, WIEN I. Rudolf Novák Gmbh., Kölnerhofgasse 4, A—1011, WIEN I.

AŬSTRALIO: Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, ST. KILDA Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGIO: Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BRAZILO: Livraria Brody Ltd., Caixa Postal 6366, SAO PAULO. Livraria D. Landy Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO

BRITIO: Collet's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH. The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

BULGARIO: Direkzia R. E. P. 11 Pl. Slawejkov SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO: P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2. P. N. S. — dovoz tisku Leningradska 14, BRATISLAVA

ĈINIO: Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

DANLANDO: Hunnia Books and Music Langemosevej 37, BAGSVAERD. Ejnar Munksgaard Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.

FINNLANDO: Akateeminen, Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCIO: Agence Littéraire et Artistique Parisienne 7 Rue Debelleyme, PARIS 3. Société Balaton 12 Rue de la Grande Batelière, PARIS 9.

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO: Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO: Újváry-Griff Titurel strasse 2, 8 MÜNCHEN 81. Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34. Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1. W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

ISRAELO: Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

ITALIO: Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

JAPANIO: Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO: Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27, BEOGRAD

KANADO: Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Arthur Street West, MONTREAL 18. Que. Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

KOREO: „Chul Bo" PHENJAN

NEDERLANDO: Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

NORVEGIO: A/S Narvesens Litteratur Tjenste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

POLLANDO: P. K. W. Z. Ruch, ul. Wronia 23, WARSZAWA

RUMANIO: OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI OSEP, ORADEA

SOVETUNIO: Sojuzpechatj. Import, Prospekt Mira 112—a MOSKVA

SVEDIO: A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, 110 10 STOCKHOLM 1. A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, 114 37 STOCKHOLM 5.

SVISIO: AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200. Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55, ALLSCHWILL

USONO: Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Scond Ave., NEW YORK 10028. Corvin Travel and Gift Parcel Service, 1590 Second Ave., NEW YORK 10028. Hungarian Books and Records 11802 Buckeye Road, CLEVELAND, Ohio 44120

VENEZUELO: Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21—105, C. 24. CARACAS

VJETNAMO: Phong Phat Hanh Bao Chi 17, Dinh Le. HANOI

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 1-a pago!

Zigzage en Esperanto-Literaturo



Enigmo de FERI

Sendu la solvon de vicoj: 1.; 40; 73.; 76, 78. Horizontalaj kaj 1., 3.. 6., 10, 12,, 14. 27, 30, 38 Vertikalaj. Ínter solvintoj ni lotumos premiojn.

Horizontalaj vicoj

1. ĜIS NUN PLEJ GRAVA BELETRA REVUO EN ESPERANTO; APERIS EN BUDAPEŜTO EN TRI PERIODOJ. FONDIS ĜIN TEODORO SCHWARTZ, REDAKTIS BAGHY, KALOCSAY, POSTE ANKAŬ BODÓ, SZILÁGYI KAJ TOTSCHE. FUNKCIIGIS ANKAŬ AKTIVAN ELDONEJON.

15. Karulinoj. — 16. La granda komerca kunven' (artikolo kaj radiko). 17. . . . bondo: senhejmulo, vagulo. — 18. Identaj konsonantoj. — 19. Vestmanier'. — 20. RJI. — 21. Dolora lasta batalo de mortanto kontra la morto. — 22. 2 — per romiaj ciferoj. — 23. Al certa spec' de hundo (prepozicio kaj radiko). — 25. . . . skopo: aparato konsistanta el peza rado, tre rapide rotacianta, Inventita de Foucault, 1852. — 26. Fel' preparita por industriaj uzoj. — 28. Nom' de granda insularo, situanta oriente de Australio kaj Nov-Zelando. — 29. Adverbo signifanta malaperon kaj perdiĝon en malproksimo. — 30. Granda rusa verkisto (Anton Pavlovič, 1866—1904.). (En la trian kvadraton skribu „H" anstataŭ „Ĥ"). — 31. Samspecaj literoj de beto. — 33. Vegetaj', ornama kun belkoraj floroj. — 35. Virina nomo. 37. Konata foto-marko de Germana Demokratia Respubliko (ORWO). — 39. Interna parto de fiŝo! — 40. TITOLO DE KOLEKTAĴO DE KRITIKAJ STUDOJ DE LUDOVIKO TOTSCHE. APERIS EN 1932. — 41. . . . izo: malo de sintezo. — 42. Poseda pronomo aŭ adjektivo plurala. — 43. Amerika poeto (Edgar Allan; 1809—1849.) — 44. Vasta etendaj' de akvo. — 45. Prepozicio. — 46. Natura pikil' de vegetaĵoj. — 47. Konsonantoj de la unua monato. — 49. Kiom' de la tempo pasinta depost la naskiĝo. — 50. Optika instrument', kiu ebligas vidi malproksimajn objektojn. — 51. Reen: naskito, infano, posteulo. — 53. Kemie difekti la surfacon de io. — 55. Rezulto de matĉo sengola. — 56. Gaso uzata por reklama lumigado. — 59. Konjunkcio. — 61. Malsaneca sento de sufoko kun korpremateco. — 63. Rezult' de sportludo atingata per jeto de pilko en la celon. — 64. Ekstremaje. — 66. Estinta Hindia ŝtatestro. — 67. Kemia simbolo de kalcio. — 68. Multenombr'. 69. Numeralo. — 70. Prepozicio. — 72. Duono de salto! — 73. ESPERANTA POETO, VERKISTO, FERVORULO DE SAT. FUNGARO. (1902—1961.) — 74. Antaŭsciigo, atentigo. — 76. DRAMO DE SHAKESPEARE; ESPERANTIGIS K. KALOCSAY. — 78. TRIAKTA LIRIKA KOMEDIO DE J. BAGHY.

Vertikalaj vicoj

1. TITOLO DE TRIA POEMARO DE J. BAGHY. APERIS EN 1933. — 2. Fantazii, supozi. — 3. NOBEL-PREMIITA HINDA POETO, VERKISTO. SEP NOVELOJ APERIS DE LI EN ESPERANTA TRADUKO DE LAKSHMISWAR SINHA, SUB TITOLO: „MALSATA ŜTONO" — 4. Kemia elemento, gaso. — 5. Duonrido! — 6. MULTE KONTRIBUIS AL DISVASTIGO DE NACIAJ LITERATUROJ INTER ESPERANTISTOJ (ANGLA, BULGARA, ĈEHA, ĈINA, DANA, HUNGARA, KTP.) — 7. „Mister . . . aĉetas mil okulojn": titolo de detektiva romano de Jean Forge. — 8. Sufikso uzata por esprimi objektojn, kiuj en si entenas aliajojn. — 9. Ĉiu ekstrema flanko. — 10. KLASIKA HUNGARA DRAMVERKISTO. LIA ĈEFVERKO: „LA TRAGEDIO DE L'HOMO" ESTIS TRADUKITA DE K. KALOCSAY. (EN LA LASTA KVADRATO STARAS KOMENCLITERO DE BAPTONOMO). — 11. OF. — 12. NOVELKOLEKTO DE HUNGARA VERKISTO FREDERIKO KARINTHY. APERIS ESPERANTLINGVE EN TRADUKO DE KARLO BODÓ. — 13. Franca urbo proksime al la svisa landlimo. — 14. ARTA SPECO DE „DANCU MARIONETOJ" DE J. BAGHY. — 19. Persona pronomo. — 22. Sufikso esprimanta ĝeneralan ideon de naskiteco. — 27. Vira nomo. — 27. RUSA ESPERANTA POETO, BLINDULO. AŬTORO DE „CIGANINO" (ASILIJ, 1890—1952.) — 28. OE. — 29. Kemia simbolo de fero. — 30. LA LASTA VERKO DE J. BAGHY, APERIS EN 1966. ORIGINALE VI REVERKITAJ POPOLFABELOJ DE DEKDU FOLKLOROJ. — 32. ktroda lamp'. — 33. Prefikso montranta la proedziĝan parencecon. — . Mezo de ondo! — 36. Romia poeto, lingvisto, polihistoro, vivis en la dua arcento antaŭ. Kristo (Marcus Terentius). — 38. FRANCA PROFESORO PREZIDANTO DE AKADEMIO DE ESPERANTO, TRADUKISTO, EDAKTISTO, VORTARISTO. KUNAŬTORO DE PLENA VORTARO, LENA GRAMATIKO, PARNASA GVIDLIBRO, KTP. — 48. Duono de robo! — 50. Persona pronomo singulara. — 52. Malhoneste maljuste (akiri avoron). — 54. DJ. — 57. Parto de meteoro! — 58. NO. — 60 Farmbienisto — en la angla lingvo. — 62. Organika teksaĵo, ligilo inter cerbo kaj sentor noj kaj muskoloj. — 63. Kemia simbolo de galiumo. — 64. . . . ŝton pla onda ŝtono por pisti a pecetigi grenon. — 65. Lukse vivanta riĉ — 7. Persona pronomo, malofte uzata. — 71. Gut' da vaporo sur vegeta - 72 Numeralo. — 75. RĜ. — 76. Mezo de arbo! — 77. Reen: kemia sin o d molibdeno

La solvo de la kruĉvortenigmo aperinta en Hungara Vivo No. 2/70 tekstas:

Vi tronu brile ruĝa stelo,
de kiam sentas hom' mizeron,
ruĝa stelo donis esperdn.

El la solvintoj de nia kruĉvortenigmo gajnis libropr mion: Miroslav Hromas, Mysliveckova 479, Hradec Králové, CSSR, Csaba E edi, Budapest, XIV., Május 1. u. 21, Kerékgyártó Ildikó, Debrecen, Szoboszlói nt 47.

Al Aleksander Bogdanov, USSR, Jozefo Rábi, Hungarujo, Székesfehérvár, Soulcerite Neilande, USSR, Riga, Boguslaw Sobol, Polando, Vjetnama Esperanta Asocio, Hanojo, Günter Bartz, Dortmund, András Garamvölgyi, Hungarujo, Nyiregyháza, kaj al aliaj ni dankas la novjarajn londezurojn. kaj ankaŭ Hungara Vivo deziras ĉion bonan.

"Literatura foiro"

– la plej nova literatura revuo

En julio de 1970 aperis ĝia unu numero, eldonita de la Milana Esperanto Klubo „La Patrolo". Ĝia dua numero, kiun mi intencas nun prezenti, aperis en aŭgusto.

Laŭcele ĝi estas kultura gazeto: „. . . senbrue ĝi aperis, ĝi preskaŭ flustris sian mesaĝon al malmultaj bonvolaj legantoj . . ." enkondukas ĝin la direktoro, Giorgio SILFER (ĉu pseudonimo?). Tiu flustro tamen estas aŭdinda. Jam lia originala novelo estas rimarkinda: la „Virinoj de la Kvina Avenuo", kiu filozofe proksimiĝas al komplika socia problemo de lia lando, al prostitueco. La kundirektoro Nicolino ROSSI publikas sian originalan verkon, premiitan en la Belartaj Konkursoj de la lasta Viena Kongreso. Li estas „poeto de melankolia vervo, kantanta sian hejman mondon kaj siajn intimajn sentojn per splena, sed freŝa voĉo".

Krom originalaĵoj, la revuo prezentas la italan literaturon en tre bonaj tradukaĵoj (kio, cetere, pruvas la tre similan muzikecon de Esperanto kaj la Itala). En eleganta traduko de Luigi *Minnaja* eksonas la ĉefverko de Ugo FOSCOLO: „Pri la tomboj".

Tiuj du tendencoj: la instigo al verkado kaj tradukado — estas ŝajne la ĉefaj. Sed, krom literaturaĵoj ni trovas estetikajn, pedagogiajn, lingvistikajn artikolojn. Rimarkindaj estas la artikoloj pri la nuntempa itala filmo kaj la socilingvistika studaĵo de D-ro Szerdahelyi pri la stilistikaj karaktertrajtoj de la junulara lingvo.

Ankaŭ pri movadaj problemoj okupiĝas la revuo: *Asterisko* kun granda elano analizas la junularan movadon kaj akre vipas la deformitajn ideologiajn elkreskaĵojn kaj deflankiĝojn.

La junularo sincere salutas la novstilan, aŭtoraĝvoĉan, modernan revueton kaj deziras al ĝi sukcesan.

Zsuzsa Haszonits-Vargha

medimpex

Hungara Eksterlandkomerca Entrepreno pri Farmaciaj Produktaĵoj

Budapest, 5 • Poŝtkesto 126

EKSPORTAS-IMPORTAS

Farmaciaj specialaĵoj • Farmaciaj bazmaterialoj • Vakcinaĵoj por hom- kaj best-terapeŭtikaj celoj • Veterinaraj drogoj • Furaĝaldonaĵoj • Laboratoriaj kemiaĵoj • Biokemiaj produktaĵoj • Radioaktivaj produktaĵoj • Volatilaj oleoj • Kuracplantoj • Resanigaj kaj amaraj akvoj

TANNIMPEX

Eksportas la hungarajn ŝuojn de eminenta kvalito,
elegantajn peltmantelojn
kaj unuaklasajn, laŭmodajn gantojn
kaj led-galanterivarojn

TANNIMPEX

BUDAPEST, VI. VÖRÖSMARTY UTCA 35.